

aprilo 1971
64-a jaro
n-ro 785 (4)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



BATALI KONTRAŬ
RASBATALO

Vi trovos

sur paĝoj 63–64 novan iniciaton de la vicprezidanto de UEA s-ro Erik Carlén, estrarano de UEA pri turismo. La lasta iniciataĵo de s-ro Carlén, la Semajno de Internacia Amikeco, jam establiĝis kiel tradicio en tre multaj landoj de la mondo, kaj ni esperas raporti resume en venonta numero pri la rezultoj atingitaj en 1971. La nova projekto havas komunan trajton kun la Semajno. Ambaŭ iniciatoj celas per praktika kaj utila agado samtempe informadi la publikon pri la Internacia Lingvo.

Sur la paĝo 65 profesoro Lapenna daŭrigas sian artikolserion pri la informado kiel ampleksigon de la Baza Principaro (de Frostavallen). Ni rekomendas al ĉiuj aktivuloj sur tiu kampo tradudon de ambaŭ artikoloj kaj volonte ricevos iliajn rimarkojn.

Enhavo

- 61 Rasismo kaj rasa diskriminacio (Sadler)
- 62 Lernetos Esperanton ĉiuj bazlernejanoj en Havajo
- 62 Ĉu televido minacas malgrandajn kulturojn?
- 62 Granda interesiĝo pri la Monda Skolta Ĵamboreo
- 63 Monda Turismo (Carlén)
- 64 Plej vendataj eldonaĵoj en 1970
- 65 Por pli efika informado (4): Lingvo kaj lingvo-projekto
- 66 Historio de spesmilo (Holzhaus)
- 68 Recenzoj
- 69 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj)
- 72 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 73 “Ŝajnase” (letero)
- 74 56-a Universala Kongreso, Londono, aŭgusto 1971
- 75 Scienca evoluo kaj la jaro 2000 (konkurso de eseoj)
- 76 Esperanto en radio
- 77 Entreprenema sekcio en Nov-Zelando (TEJO-paĝo)
- 78 Pli ol 2600 gld. per kolektado de poŝtmarkoj
- 78 Oficiala informilo n-ro 444
- 79 Korektoj
- 80 Anoncetoj

La kovrilo

Rasaj diferencoj ne estas simpla kontraŭeco inter nigro kaj blanko (kiel simbolo prezentas ilin nia kovrila bildo), inter nordo kaj sudo, oriento kaj okcidento aŭ iu ajn alia paro da ekstremoj. Interrasaj bataloj tamen plej ofte fontas el tiaj nigra/blankaj konceptoj, kiuj emfazas diferencojn kaj ignoras la komunajn trajtojn.

Preskaŭ same danĝeraj estas la naivaj ideoj de tiuj, kiuj ignoras diferencojn kaj volas rigardi ĉiujn homojn kiel samajn. Evidente, fizikaj trajtoj kiel haŭtkoloro en si mem ne gravas. Diversaj rasoj tamen — ĉu pro genetikaj diferencoj, ĉu pro nure kulturaj apartaĵoj, kiel la lingvo — ja kondutas kaj pensas tre diverse. Harmonian kunlaboron kaj kunvivadon oni atingas, ne per ignorado kaj bagateligo de lingvaj, kulturaj kaj rasaj diferencoj, sed per reciproka kompreno kaj akcepto de malsamaj vivmanieroj.

Unuiĝintaj Nacioj deklaris, ke la jaro 1971 estu Internacia Jaro de Agado por Kontraŭbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion. Luktante por lingva egaleco inter la popoloj, ni ne forgesu serĉi samtempe solvojn ankaŭ por la aliaj kulturaj diferencoj, kiuj tro ofte formas bazon por reciproka malfido kaj diskriminacio.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. **Fondita** en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Redaktoro: f-ino A. Nagata.

Inkluzivas la organon de TEJO “La Juna Vivo” (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Aŭstralio, Nov-Zelando 13,75; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Usono, Meks. 5,50; Isr. 2,75 gld. **Anonc-tarifo:** 1 p. 285 gld., 1/2 p. 150 gld., 1/4 p. 85 gld., 1/8 p. 50 gld. 1/16 p. 35 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 89 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado: G. Becker, D-6653 Bliesskastel, Alter Hangarten 2, F.R.G.

Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: U.J. Moritz, D-5161 Merken, Andreasstr. 57, F.R. Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris 17^e, Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonaĵoj: J. Uśpieński, Poŝtkesto 100, Warszawa-12, Polujo.

Estrarano pri financoj kaj administrado: E.J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Rasismo kaj rasa diskriminacio

Unuiĝintaj Nacioj deklaris la nunan jaron 'Internacia Jaro de Agado por Kontraŭbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion'. Al tiu agado UEA — kiu laŭ sia Statuto celas *plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo* — povas aliĝi tutkore, minimume per morala apogo kaj informado.

Rasismo estas doktrino, laŭ kiu unu raso estas en si mem supera al alia, aŭ laŭ kiu la rasoj ne devas interrilati, ekde seksaj rilatoj ĝis, en la plej ekstrema formo de rasismo, ĉiu ajn socia kontakto. Rasa diskriminacio signifas malfavoran traktadon de homoj pro la nura fakto, ke ili apartenas al tiu aŭ alia raso.

Sed kio estas raso?

Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro*, raso estas kolekto de homoj, kiuj montras ĉe siaj korpaj trajtoj la samajn heredajn karakterojn. Ĝi aldonas la rimarkon, ke 'raso estas nocio biologia, sed neniel lingva aŭ kultura (→ *etnio*) aŭ historia (→ *gento, tribo*).' Tio kompreneble ne signifas, ke la diversaj rasoj ne montras tre diversajn lingvojn kaj kulturojn kaj historiojn. Ĝi signifas, ke tiuj aspektoj ne estas esencaj por difini rason. Negro, ekzemple, povas paroli la francan lingvon tute kiel blankhaŭta franco kaj esti laŭ sia cetera konduto nedistingebla disde franco. Tamen lian *rason* decidas liaj korpaj trajtoj.

Statistika nocio

Ĉe tio necesas aldoni, ke la biologia nocio *raso* estas ankaŭ statistika nocio. Interne de la rasaj grupoj oni trovas grandan diversecon de korpaj trajtoj, tiel ke oni nur teorie — statistike — povas starigi ian normon, ian 'mezan' tipon de la raso. Nur pro la fakto, ke ekzistas pli grandaj korpaj diferencoj inter diversaj homgrupoj, ol inter la individuoj interne de tiuj grupoj, oni entute povas paroli pri rasaj distingo. En kelkaj mondpartoj, ekzemple Havajo, la rasoj jam tiagrade intermiksiĝis, ke estas ofte maleble preskribi individuojn per rasaj etiketoj. Eble iam venos epoko, kiam, pro la kreskanta migrado de individuoj de unu lando al alia, pro la disfalo de la lingvaj baroj kaj la oftigo de interrasaj geedziĝoj, ne plu ekzistos disaj rasoj loĝantaj en difineblaj regionoj de la mondo, sed nur unu bunta homaro kun granda varieco de haŭtkoloroj, harspecoj, vizaĝaj trajtoj ktp.

Kiel nun kompreni la pretendojn de rasistoj, ke unu raso estas supera al alia?

Estus malfacile akcepti, ke unu korpa trajto estas en si mem 'supera' al alia: ekzemple, ke plata nazo estas iel pli bona, ol longa, elstara nazo, aŭ inverse. Sendube, iuj korpaj ecoj donas avantaĝojn en difinitaj klimatoj, sed pri tio kutime ne temas la pretendoj de rasistoj. Ankaŭ korpa beleco estas tute subjektiva afero, pri kiu oni apenaŭ povas fari seriozajn komparojn inter la rasoj. Rasistoj kutime kredas, ke la anoj de ĉiu raso heredas, apud la korpaj karakterizaĵoj, ankaŭ mensajn, moralajn aŭ psikajn ecojn: ekzemple, superan inteligenton, mallaborem, pi-

econ aŭ alian kvaliton. Neniu dubas, ke diversaj popoloj montras en sia kulturo malsamajn emojn: ke ĉe unu elstaras muzikemo, ĉe alia organizemo, ĉe alia ankoraŭ gastamo. La kerna demando estas: ĉu tiaj emoj estas hereditaj kiel la okulkoloro, aŭ ĉu ili estas nur transdonitaj tra la generacioj per edukado.

Eksperimentoj

Edukado certe ludas grandan rolon. Pro tio neniu ĝis nun sukcesis mezuri per komparaj testoj la inteligenton de diversaj popoloj aŭ rasoj, kiel ion denaske deciditan. En eksperimentoj pri bestoj oni povas laŭvole manipuli la kondiĉojn, sub kiuj la junaj bestoj kreskas, laŭvole parigi difinitajn individuojn kaj tra pluraj generacioj mezuri la konduton de bestoj, kies 'eduko' estis ĉiurilate identa kaj kiuj diferencas nur en sia heredo. Per selektado de ratoj, ekzemple, sciencistoj sukcesis produkti apartajn grupojn kun elstaraj ecoj, kiel batalemo aŭ timemo.

Ĉe la homoj, tiaj eksperimentoj ne estas imageblaj, kaj tial ne estas eble pruvi science, ĉu la efikoj de proksima interpariĝado tra multaj sinsekvaj generacioj faras iun popolon inventema aŭ militema, aŭ ĉu tion faras nur la kulturaj kondiĉoj: alte evoluinta kleriga sistemo aŭ militisma tradicio en la regado.

La rasistoj ne havas sciencan bazon por siaj pretendoj pri superaj kvalitoj de unu aŭ alia raso. Aliflanke, denaskaj karakteraj diferencoj *povas* ekzisti; ne eblas pruvi, ke ili ne ekzistas.

Ĉu do rasismo kaj ras-apartismo povas esti pravaj?

Neniel! Unue, se ekzistas hereditaj karakteraj diferencoj inter la rasoj, tiuj diferencoj estas certe multflankaj kaj kompleksaj. Kial supozi, ke ĉiuj diferencoj favoras nur unu el la partioj? Se raso A iomete superas rason B rilate al unu kvalito, ĉu B ne povas tion kompensi per alia kvalito? Due, la fakto, ke en ĉiuj sferoj de la vivo estas troveblaj elstaraj individuoj el plej diversaj rasoj, klare montras, ke la diferencoj inter individuoj en unu sama raso estas multoble pli grandaj, ol la eventualaj diferencoj inter la rasoj. Tial neniu politiko povas esti prava, kiu kondamnas tutan homgrupon al malsupera pozicio surbaze de rasa teorio aŭ kiu diskriminacie traktas unuopajn personojn pro iliaj korpaj trajtoj kaj senkonsidere pri ilia efektiva merito.

Netolerebla malpermeso

Pro la samaj kaŭzoj, malpermeso de interrasa geedziĝo havas nenian sciencan pravigon kaj prezentas netolereblan intervenon en la homajn rajtojn de la individuo. El biologia vidpunkto, la efiko de rasa intermiksiĝo povas esti nur favora por la homa specio.

La pozicio de la Esperanto-movado antaŭ rasismo kaj rasa diskriminacio devas esti senkompromisa. En 1971 ni faru specialajn klopodojn por konstrui pli facilajn rilatojn ne nur inter ĉiuj lingvaj grupoj sed ankaŭ inter ĉiuj rasoj de la mondo.

V. Sadler

Lernetos Esperanton ĉiuj bazlernejoj en Havajo

La insularo Havajo, usona ŝtato en Pacifiko kun proksimume 800 mil loĝantoj, enhavas plurajn rasojn kaj plurajn lingvojn.

Kiel jam raportite en ĉi tiu revuo (n-ro septembro 1970, p. 141), la atento al Esperanto en la lerneja kampo en Havajo fariĝis pli kaj pli vigla. Ekde septembro 1971 ĉiuj elementaj lernejoj intencas instrui Esperanton kiel elementon en kurso pri la funkciado de lingvoj, en kiu oni interalie pritraktos la kriteriojn por internacia lingvo. La celo de la instruado de Esperanto ne estas igi la infanojn ellerni ĝin, sed estas doni al la infanoj mondan koncepton kaj eventuale instigi ilin prove verki propran simplan "lingvon". Kvantam la instruistoj mem ne bone konas Esperanton en la nuna stadio, tiu orientiĝo al mondkoncepta edukado estas jam granda paŝo.

Estas antaŭvideble, ke kiel kromproduktaĵo povos okazi, ke la infanoj petos vortarojn kaj korespondamikojn, kiam ili konatiĝos kun la lingvo.

Granda interesiĝo pri la Monda Skolta Ĵamboreo

Kono de Esperanto — unu el la kvalifikoj por elekto

Oni antaŭvidas, ke kolektiĝos 20 000 skoltoj el la tuta mondo al la monto Fuji apud Tokio por la 13a Monda Ĵamboreo, okazonta de la 2a ĝis la 10a de aŭgusto 1971.

Okazis prov-tendumado en aŭgusto 1970 fare de japanaj skoltoj, en la sama loko, kie la Monda Ĵamboreo okazos. Al tiu prov-tendumado partoprenis dumil japanaj skoltoj. Sed montriĝis jam tiam, ke necesos limigi la nombron de japanaj partoprenantoj al la Monda Ĵamboreo. La emo de la japanaj skoltoj al partopreno estis tiel granda, ke oni devis finfine fiksi la nombron de japanaj skoltoj je 8 000, nome po 2 skoltoj por unu skolta grupo.

Por la elekto, la scio de Esperanto estas unu el la kvalifikaj faktoroj, kion mencias *World Scouting*, la oficiala gazeto de Monda Skolta Oficejo.

Letero de 3 skoltoj usonaj

Tri skoltoj en Walla Walla, Usono, kune skribis leteron al la prezidanto de Japana Skolta Federacio, en

la 22a de januaro 1971 (kaj samtempe sendis ĝian kopion al ĉiu nacia reprezentanto de Skolta Esperanto-Ligo).

En ĝi ili mencias, ke ili komencis lerni Esperanton en septembro 1970, ĉar ili "aŭdis, ke skoltoj en aliaj mondopartoj ankaŭ faras la samon". Ili rimarkigas, ke la oficialaj lingvoj de la Ĵamboreo ne bone subtenas la ĵamborean temon, t.e. "Por pli bona interkompreniĝo", kaj proponas la uzon de Esperanto.

Ĉu televido minacas malgrandajn kulturojn?

La kreskanta influo de televido prezentas gravan minacon al la kultura sendependeco kaj unikeco de la malpli grandaj popoloj. Tiun opinion, lastatempe plurfoje tuŝitan ankaŭ de aliaj fakuloj, emfaze ripetis Martin Esslin, ĉefo de la drama sekcio de BBC, en ĵusa artikolo en la revuo Kuriero de Unesko.


Televido — argumentas Esslin — kreas bezonon je granda nombro da verkistoj, aktoroj, artistoj k.a. talentuloj, ĉar al tutlanda spektantaro ne eblas daŭre prezentadi la samajn vizaĝojn, samajn teatraĵojn, samajn spektaklojn. En ĉiu popolo la nombro de tiaj talentuloj estas limigita proporcie, kaj sekve ĉiu malgranda popolo frontas al la neebleco mem produkti ĉion, kion postulas la televida servo kaj ĝia publiko.

La rezulto — jam klare videbla en malgrandaj landoj kiel Nederlando, Svislando kaj aliaj eŭropaj — estas neevitebla invado de importitaj televidaj filmoj, unuavice de la pli grandaj popoloj. Precipe Usono vaste superregas en la produktado de televidaj programejoj. La enlanda kulturo komencas droni en tiu de la grandaj fremdaj landoj.

Se temas pri landoj de Eŭropo, oni povas supozi, ke ankoraŭ la malnovaj kulturoj de la unuopaj landoj eltenos la konkurencon. Pri la evolulandoj, precipe en Afriko, kie ofte mankas literaturo, teatroj, artgalerioj k.s., la aŭtoro timas "katastrofan" perdon de la kultura propraĵo de la unuopaj popoloj. Kiel eblan kontraŭrimedon li proponas la prudentan miksadon de televid-importaĵoj el kiel eble plej multaj lingvaj kaj kulturaj regionoj de la mondo.

Feliĉe, tia mikسادo de lingvoj kaj kulturoj baldaŭ ne plu dependos sole de la televidaj instancoj de la koncerna lando. Fakuloj prognozas, ke post nur kelkaj jaroj la satelita tekniko ebligos al ĉiu posedanto de televidilo ricevi programojn de ĉiuj partoj de la terglobo. Tiam la potenco de la enlandaj aŭtoritatoj estos draste reduktita. La spektantoj povos mem decidi, same kiel nun decidas la radio-aŭskultantoj, al kiaj kulturaj influoj ili submetos sin, kaj kiujn lingvojn ili aŭskultos.

Restos la danĝero, ke la plej "grandaj" kulturoj tamen superregos, sed tiu superrego almenaŭ ne plu estos tiel unuflanka, kiel en la nuna tempo.



Kun la evoluo de scienco kaj tekniko, ankaŭ vojaĝado fariĝas pli kaj pli facila kaj samtempe relative malpli kosta ol iam antaŭe. La bezono de la Internacia Lingvo estas forte sentebila sur la turisma kampo, kiu ĉiam pli populariĝas. Ĉu la ĉi tie prezentitaj metodoj estas la plej taŭgaj por informado pri Esperanto sur tiu kampo, oni nun ne povas juĝi. S-ro Carlén, prezidanto de la nove fondita organizaĵo Monda Turismo, kredas, ke ili donas realan ŝancon de sukceso.

**ERIK
CARLÉN**

Nova asocio: Monda Turismo

Mi ne estas tute certa, ke ni esperantistoj ĝenerale konscias, kian grandan revolucion por la homaro la tutmonda akcepto de facila, neŭtrala lingvo internacia alportus. Kulture, science, ekonomie, komerce, porpace ni apenaŭ povas trotaksi tion. Ne estas dubo, ke por tiu celo ekzistas nur *unu* taŭga lingvo, Esperanto, vere internacia, nuancorica, elprovita kaj evoluinta dum preskaŭ unu jarcento. Kara leganto, ĉu ne estas nia morala devo ĉiel informi pri Esperanto, mem uzadi ĝin kaj utiligi ĝin?

Unu medio, en kiu ni ĝis nun tro malmulte laboris, estas la turismo. Kaj tamen ĝi estas kampo, kiu bezonas internacian lingvon kaj kie ni je minimumo da kostoj kaj laboro povas atingi rezultojn. La turismo hodiaŭ estas potenca "industrio", ankoraŭ kreskanta. La teknika evoluo de la transportiloj kaj la ĝenerala altiĝo de la vivnivelo ebligas tion. Homoj hodiaŭ vojaĝas multe pli ol antaŭe. Preskaŭ ĉiuj havas libertempon, kiun multaj utiligas por vojaĝi al alia lando. Ni ĝojas pro tio, ĉar turismo tute same kiel la Internacia Lingvo kontribuas al paco en la mondo.

Por utiligi Esperanton kaj diskonigi ĝin en turismo estis fondita speciala turista organizaĵo esperantista dum la UK en Vieno.

Ĉu nova organizaĵo? Ĉu ni ne havas sufiĉe da tiaj en la movado, kiuj certe malsanas pro surpapera organizaĵa elefantiado? Mi bone komprenas, kaj kun la plej granda hezito mi partoprenis la fondiĝon de tiu nova asocio en la movado. Sed ne timu: Tiu ĉi nova organizaĵo, kiu portas la fieran nomon Monda Turismo, nek intencas esti nur surpapera nek intencas malplenigi vian monujon sed nur helpi al vi dum vojaĝoj kaj fari Esperanton "konata en turismaj rondoj".

Kiel laboros Monda Turismo?

a) Recenzoj de turistaj aranĝoj

La turistaj entreprenoj, egale ĉu ŝtataj aŭ privataj, flugkompanioj, vojaĝaj agentejoj, hoteloj aŭ butikoj, estas tre sentemaj por publikaj laŭdoj aŭ plendoj (= kritiko). Monda Turismo (= M.T.) celas krei, kunordigi, kontroli kaj publikigi tian kritikon (= recenzon) pri turistaj aranĝoj. La publikigo povas unue okazi en la Esperanta gazetararo, ekz-e sub la rubriko: "Monda Turismo informas". (Ni ja havas la bonegan gazeton de d-ro Unger, Turista Mondo, kiun ni kompreneble danke eluzos.) Esperantistoj poste povas publikigi tradukojn en la nacia gazetararo, kompreneble indikante Mondan Turismon.

Monda Turismo povas ankaŭ skribi rekte al turistaj entreprenoj pri kritiko. Tiel la nova asocio povas fariĝi ia tre utila sindikato por turistoj egale ĉu esperantistoj aŭ ne.

b) Rekomenco de turistaj entreprenoj

En butikoj en multaj landoj oni vidas afiŝetojn aŭ ŝildetojn kun rekomendo de tiu aŭ tiu turista organizaĵo. La teksto plej ofte estas en angla lingvo. (*Diners' Club, Anglo American Tourist Association, Language Service*, por nomi kelkajn.) Mi ofte min demandis: Kial ni esperantistoj ne povus fari same? Ni ja estas internaciaj, kaj ni ofte vojaĝas. Per tia malgranda rekomendafiŝeto en butikoj, hoteloj, restoracioj k.t.p. ni povus vidigi interalie la vorton Esperanto kaj la verdan stelon. La afiŝetoj surhavas la tekston: "Rekomendata de Monda Turismo. ES-
PERANTO". La tri lastaj vortoj estos en la emblemo de la asocio.

Se ni povos aperigi la afiŝeton de Monda Turismo en la plej bonaj entreprenoj turistaj, ni bone subtenos la ĝeneralan informadon pri Esperanto. Samtempe la aktiveco per la rekomendaj afiŝetoj kreas konon kaj respekton por nia asocio Monda Turismo. Tio estas tre grava, por ke ni havu influon en turistaj medioj. Nur tiam ni efike povas helpi al niaj membroj kaj aliaj turistoj.

Sed ne temas pri nura informado. Devos esti vera rekomendado de absolute rekomendindaj entreprenoj. Do la celo ne estas iu amasdistribuo, sed tre limige oni donu la afiŝetojn al la plej bonaj kaj plej rekomendindaj entreprenoj. Se oni troe disdonos la rekomendojn, la tuta afero perdos sian sencon kaj mem mortos.

Por efektiviĝi nian planon pri la rekomendoj ni devas havi kunlaboron kun bonaj esperantistoj, precipe en turistaj lokoj. Tio estus tasko por la Esperantaj kluboj kaj societoj, ĉar la loka informado apartenas al ilia laboro.

c) Kofraj etikedoj

Ni preparas ankaŭ kofrajn etikedojn por niaj membroj. Tiel ni kreas veran rimedon por la esperantistoj uzadi siajn kofrojn ankaŭ por konigi nian lingvon al ŝoforoj, fervojistoj, personaro de flugkompanioj, portistoj, doganistoj kaj al aliaj turistoj. La etikedo ankaŭ estas bona distingilo, kiam la kofro venas inter 50 aliaj. Ĉiu membro de la asocio ricevos kelkajn ko-

PLEJ VENDATAJ ELDONAĴOJ EN 1970

— Popularaj: ĉarme ilustritaj libretoj

La plej vendata Esperanta libro de la jaro 1970 estis *Oportuna vortaro de ordinara Esperanto* de Vilho Setälä, ĉarme ilustrita poŝlibro kun difinoj en Esperanto. Tion montras statistiko de la Libroservo de UEA, en kiu ĝi konsideras nur la unuopajn vendojn rekte al la mendantoj (do ne tiujn, kiujn peras revendistoj). La oktobra numero de *Esperanto*, 1970, enhavis specimen-folion pri la poŝvortaro.

Alia verko de Vilho Setälä, la lernolibro *Privilegia vojo*, troviĝas regule inter la plej vendataj libroj, sed en 1970 superis ĝin en la kategorio de lernolibroj la duvoluma ilustrita lernolibro de István Szerdahelyi, *Esperanto I kaj II*. Kvankam kun kelkaj klarigoj kaj vortareto hungarlingvaj, tiu modernaspekta, fortike

bindita lernolibro estas tre bone uzebla internacie, precipe en lernejoj. Por daŭriga studado, la legolibro *Paŝoj al plena posedo*, de William Auld, elstaris en sia klaso jam la duan jaron sinsekve. Intertempe ĝi atingis la duan, reviziitan eldonon.


Sur la kampo de pri-Esperantaj verkoj, tri libroj atingis preskaŭ saman rangon: *Parnasa gvidlibro*, *Ne tiel, sed tiel ĉi*, kaj *Gvidlibro por supera ekzameno*, dua volumo.

Ĉu pro la proksimiĝo de la Universala Kongreso en Britujo, ĉu pro ĝia draste rabatita prezo, *Angla antologio*, redaktita de William Auld kaj Reto Rossetti, estis la plej vendata belliteratura libro de la jaro. Trian sukceson por William Auld signas la dua eldono de lia longa poemo *La infana raso*. Jam la duan jaron sinsekve ĝi staris je la pinto de la originalaj belliteraturaĵoj, kvankam ĉi-jare egalnivele kun la poezivolumo *Libro de amo*.

Inter nefikciaj verkoj plej rapide vendiĝis la broŝuro *Oriento kaj okcidento* de Georges Fradier, ankaŭ ĝi forte rabatita.

La disko *Internacia elparolo*, lanĉita en 1964 kaj dufoje reeldonita, restas plue populara. Ĝi estis la plej vendata disko de la jaro. El muzikaj diskoj, tamen, venkis la novaj kantoj de Ramona van Dalsem, *Donu al mi vian manon*.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la prezon en guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 14% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.



MONDA TURISMO

(daŭrigo de p. 63)

froetikedojn. Kiaj ili estos? Ili konsistos el la emblemo de la Monda Turismo (vidu la bildon).

d) Aliaj labortaskoj.

Taskoj, kiujn ni estonte povos plenumi, se ni havos sufiĉe da membroj, estas ekzemple: Stimuli kaj apogi la eldonadon de turistaj broŝuroj, libroj, atlasoj, mapoj, terminaroj en Esperanto. Ni esperas, ke ni iom post iom povos iniciati aŭ mem aranĝi vojaĝojn por esperantistoj. La italaj esperantistoj montris al ni la vojon, kiam ili dank' al lerta kaj sindona laboro de gesinjoroj Grattapaglia aranĝis la vere sukcesan krozadon sur Mediteraneo pasintan septembron. Tiu turista aranĝo estis bonega informado inter pli ol

500 neesperantistaj pasaĝeroj, kiuj dum tuta semajno povis konstati, kiel bonege Esperanto funkcias praktike.

Erik Carlén,
Prezidanto de Monda Turismo

Monda Turismo akceptas individuajn membrojn. La membreco validas por tri jaroj, kaj la membrokotizo estas 60 belgaj frankoj (= 4,15 gld.). Oni akceptas ankaŭ kolektivajn membrojn (t.e. Esperantaj grupoj, asocioj). Provizore la kotizo por kolektivaj membroj estos la sama, t.e. 60 belgaj frankoj. La kotizon akceptas la kasistino de MT, f-ino Maria Henquinez (1171 St. Maartensdal, B-3000 Leuven, Belgujo, poŝtĉekkonto 9532.76). Kontraŭ la kotizo oni ricevos membrokarton, kofroetikedojn kaj prospektojn, kiam ili estos eldonitaj. (Ĝenerala sekretario de Monda Turismo estas s-ro Nikola Nikolov, PK 45, Sofia, Bulgarujo.)

Lingvo kaj lingvo-projekto

IVO
LAPENNA

En la ĉapitreto pri la kvalito de nia informado la Principaro de Frostavallen rekomendas ne menciadi "diversajn projektojn de komuna lingvo"*.

Kian sencon havas tiu rekomendo, kaj ĉu ĝi ankoraŭ estas aktuala?

Dum multaj jaroj — fakte ekde la naskiĝo de Esperanto — personoj okupiĝantaj pri la disvastigo de la lingvo kutimis, en siaj skribaj aŭ parolaj eksplikoj, proprainiciate menciadi ankaŭ diversajn projektojn de internacia komunikilo kaj nomadis ilin "internaciaj lingvoj". Poste, eĉ niaj informaj fakoj kaj iliaj kunlaborantoj faradis, kaj kelkaj el ili plu faras, la saman eraron. La formulo kutime estas: ja ekzistas "multaj internaciaj lingvoj", sed "Esperanto estas la plej bona".

Pro tiu grava misprezento, en nacilingvaj gazetoj, periodaĵoj, enciklopedioj kaj aliaj verkoj oni ofte egaligas nian lingvon kun *volapük*, *ido* kaj aliaj, pli ĝisdataj, lingvoprojektoj, kvazaŭ ili havus similan aŭ eĉ saman socian valoron. Unu el la sekvoj estas, ke en decidaj rondoj kaj ĝenerale en la publika opinio kreiĝas konfuza aŭ falsa imago pri la fakta situacio, kio siavice bremsas, kelkloke eĉ malebligas, la normalan progresadon de la Internacia Lingvo. La pozitivaj klopodoj estas renkontataj de pasiva sinteno aŭ rezisto eĉ en tiuj medioj, kiuj sentas la lingvan problemon kaj principe simpatias la solvon pere de neŭtrala lingvo. Ili starigas la demandon: "Kiu, do, lingvo, se ekzistas tiom da ili?"; kaj konsilas: "Unue la protagonistoj de diversaj 'internaciaj lingvoj' interkonsentu pri unusola, kaj poste venu al ni".

Bedaŭrinde, al tiu deformita bildo abunde kaj tute superflue kontribuis nia propra informa aparato: abunde, ĉar la vasta publiko, kun la escepto de strikte fakaj medioj, apenaŭ sciis ion ajn pri la okcidento da provoj krei internacian komunikilon, se ni mem ne parolus pri ili; superflue, ĉar oni povas bonege informadi pri la Internacia Lingvo kaj ĝiaj ĉiufankaj atingoj, komplete ignorante la diversajn lingvoprojektojn.

"Superflue" ne signifas "neniam", nek ĝi iel ajn implicas ian kvazaŭan timtreman fuĝon. Se la cirkonstancoj postulas, ne nur ne estas superflue, sed efektive necesas objekte prezenti ankaŭ tiun aspekton. Tio, ekzemple, devas okazi en serioza verko pri la historio de la mondlingva problemo, aŭ en respondo al konkreta demando dum iu intervjuo aŭ gazetara konferenco. En tiaj aŭ similaj cirkonstancoj la elementa postulato estas nete distingi inter Esperanto kiel vivanta lingvo, unuflanke, kaj ĉiuj lingvoprojektoj, aliflanke, kiel konsilas la Principaro de Frostavallen.


* "Fundamenta principaro de informado pri la Internacia Lingvo", publikigita en la broŝuro "Statuto kaj Reguloj de UEA", 1968, p. 60.

La dividlinio inter la du estas klara kaj simpla. Ankaŭ en tiu ĉi sfero akumulitaj kvantaj kreskoj transformiĝas en esence novan kvaliton. Lingvo estas instrumento de socia komunikado en ĉiuj sferoj de la vivo. Abstrakta sistemo de komunikreguloj, eble eĉ perfekta en sia abstrakta strukturo, sed ne uzata por interhoma komunikado en relative alta skalo, tute ne estas lingvo. Ankoraŭ malpli "internacia", ĉar por tio, aldone, estas bezonata ankaŭ vera internacieco almenaŭ el kvar vidpunktoj: interna lingva konsisto, geografia etendiĝo, socia portanto kaj celo. Plej taŭge estas nomi tian sistemon "projekto" aŭ "lingvoprojekto".

Ankaŭ Esperanto komencis sian ekzistadon kiel lingvoprojekto. Tamen, dank' al nombro da decidaj kvantaj faktoroj — ekde literatura kaj scienca kreado, tra vasta gamo da ĉiaspecaj fakaj kaj specialaj aplikoj, ĝis multnombraj ĉiutagaj rilatoj, eĉ familiaj — Esperanto transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta kolektivo, dum la aliaj projektoj neniam sukcesis eliri el tiu embria stadio. Inter vivanta lingvo, parolata entute de centmiloj da personoj tra la mondo, kaj mortnaskitaj projektoj ja estas principe grava diferenco. Tial, fakte, ekzistas nur unu vere internacia lingvo: la Internacia Lingvo aŭ Esperanto.

En la sekvantaj semajnoj kaj monatoj, okaze de landaj kongresoj kaj diversaj internaciaj renkontiĝoj, la gazetaro kaj radio sendube denove interesiĝos pri la lingva demando. Estas tre dezirinde, ke la personoj komisiitaj pri informado atentu al la supraj sugestoj kaj entute al la konsiloj entenataj en la Principaro de Frostavallen.

Tra la pasintaj jarcentoj aperis pluraj centoj da projektoj por lingvo universala, sed nur unu — Esperanto mem — sukcese transformiĝis de nura projekto al vere vivanta lingvo de vivanta socia kolektivo. Ĉi-sube: la projekto de J. Damm (1876) uzis 107 'gramatikajn signojn' por prezenti, per kombinaĵoj, la bazajn konceptojn de la homa lingvo.





Ĉekbanko Esperantista,

MERTON ABBEY, LONDON. S.W.



"La Spesmilo" (al la naciaj monunuoj): Mi havas la honoron, injuri, prezenti al vi fraŭlino "Spesmilo": esperu ni ke viaj puncoj al ĉi ĉiujn estas kiel eble plej malmultaj.

HISTORIO DE SPESMILO

Unu mondo — unu mono

Adolf Holzhaus

De tempo al tempo aperas sugestoj, ke la Esperanto-movado, dank' al siaj facilaj tutmondaj kontaktoj, povus starigi efikan kaj profitodonan internacian bankon, kompreneble kun internacia monsisistemo. En la hodiaŭa mondo, kiam la ŝtatoj mem kaj la interŝtataj organizaĵoj ofte dronas en valutaj problemoj, kiam unu el la ĉefaj obstakloj antaŭ la laboro de UEA estas tiu de la transpagoj de unu lando al alia, tiaj proponoj povas ŝajni komplete utopiaj. Kaj tamen...

Du kuraĝaj eksperimentoj en la historio de Esperanto meritas pripenson. La unua estis la spesmila monsisistemo kaj la ĉekbanko de Höveler. La dua estis la stelo-mono de Universala Ligo. En ĉi tiu artikolo Adolf Holzhaus memorigas pri la ekesto, florado kaj pereado de la unua el tiuj eksperimentoj, kiu apogis la organizon de la Esperanto-movado komence de ĉi tiu jarcento, sed fine fariĝis viktimo de la Unua Monda Milito.

Profesoro René de Saussure (17.3.1868 - 11.4.1916), svisa esperantisto kaj unu el la fruaj kaj aktivaj laborantoj sur kampo de internacia lingvo, dum legado de esperantaj ĵurnaloj rimarkis, ke sur kovrilpaĝoj de ĵurnaloj presitaj en Esperanto kaj adresitaj al homoj en diversaj landoj, la prezoj de abonpagoj estis fiksitaj en frankoj, ŝilingoj, markoj, rubloj kaj dolaroj. En 1906 venis al li en la kapon ideo pri helpa mono internacia. Li pensis tiam, ke oni povas proponi al esperantistoj akcepti unu monunuon, bazitan sur la metra sistemo. En *Internacia Scienca Revuo*, majo 1907, p. 129-137, li publikigis artikolon "Projekto pri internacia monsisistemo". En tiu artikolo li parolas, kiel por internaciaj interrilatoj estas necesa unu internacia facile ellernebla lingvo — Esperanto, por mezuroj estas necesa unu internacia mezuro — metro, tiel por diversaj monaj sistemoj estas necesa unu internacia monunuoj — speso. La nomon speso li devenigis de franca vorto "espèce" (speco; en pluralo "espèces" — kontanta mono) aŭ de angla "specie" (metalmONO).

Gramoj da pura oro

Al speso li donis tre malgrandan monvaloron, tiamaniere, ke oni povu esprimi ian ajn nacian monsumon per entjera nombro da speso. Por praktika uzo li prenis milfoje pli grandan valoron, kies nomo estis spesmilo. Krom spesmilo li enkondukis ankaŭ vorton spesdeko por signi centonan parton de unu spesmilo, ĉar en preskaŭ ĉiu lando oni uzas du monunuojn, unu centfoje pli grandvaloran ol la alia.

Por difini valoron de spesmilo li prenis orajn monerojn:

Moneroj	Pura oro (g)
25 frankoj	7,258
5 dolaroj	7,523
1 angla pundo	7,322
20 markoj	7,168

Tiuj naciaj moneroj [meza nombro estas $12,75 = (25 + 5 + 1 + 20) / 4$] valoras ĉiuj proksimume 10 spesmilojn; la mezvaloro de cititaj ormoneroj estas 7,318 gramoj da pura oro; ormoneroj ne estas puroraj; sed entenas oron nur 9/10 (0,900) aŭ 11/12 (0,91666...) de ilia pezo; elektota universala orunuoj estas pezonta 8,131 (en 9/10) aŭ 7,983 (en 11/12) gramojn aŭ esprimita per entjera nombro da gramoj — 8 gramojn. En la unua okazo stampota ormonero de 10 spesmiloj enhavos $x = 7,20$ ($x + x / 9 = 8$) gramojn da pura oro = preskaŭ precize 25 frankojn, en la dua okazo $x = 7,333...$ ($x + x / 11 = 8$) gramojn da pura oro = preskaŭ precize 1 anglan pundon. La pezo 7,3333 multe pli alproksimiĝas al meza pezo 7,318 ol al 7,20.

Spesmilo teorie havis valoron de 0,8 gramo da pura oro en la proporcio 11/12. Tiu speciala valoro estis elektita, ĉar ĝi reprezentis 2,0031 ŝilingojn, 2,0461 markojn, 1,82 skandinavajn kronojn, 2,526 francajn frankojn, 2,526 svisajn frankojn, 2,526 lirojn, 2,526 hispanajn pesetojn, 0,947 rublojn, 0,4875 dolarojn. Spesmilo (Sm.) estis dividita decimale en spescento (Sc.), spesdeko (Sd.) kaj speso (S.).

La internacia monunuoj speso estus ankaŭ tre taŭga por la poŝtaj speso kaj por internaciaj poŝtmarkoj;

en 1907 la transporta pago de letero, sendota fremdlandan, estis: 25 centimoj, aŭ 20 pfenigoj, aŭ 5 cendoj, aŭ 2½ pencoj, t.e. internacie: 10 spesdekoj (aŭ 1 spescento). Plue, se la regnestroj interkonsentus presigi internaciajn poŝtmarkojn je 1 spescento, 1 spesdeko kaj 1 speso, oni povus uzi ilin kiel internacian monon sendeblan per letero kaj tute taŭgan por malgrandaj elpagoj.

En aŭgusto 1907 la 36-a kunsido de *L'Association Française pour l'Avancement des Sciences* (Franca Unuiĝo por Progresigo de Sciencoj) laŭ proponoj de s-roj Lacour kaj Bourlet alprenis speson kiel bazon por internacia "eltrovita" mono. Ĉirkaŭ tiu sama tempo *Schweizerischer Bankverein* (Unuiĝo de Svisaj Bankoj) enkondukis eksperimente internaciajn spesmilo-ĉekojn; valoroj estis indikitaj senescepte en spesmilo-sistemo kaj la tuta teksto estis jam presita en Esperanto. Samjare banko de Ern. Pictet en Genève, Svislando, eldonis similajn ĉekojn ankaŭ kun Esperanta teksto.




En *Projekto pri internacia monsisistemo* sur p. 136, R. de Saussure presigis tabelon, montrantan la valoron de la diversaj naciaj monunuoj rilate al la internacia.

Restis por Herbert F. Höveler (3 feb. 1859 – 1 sep. 1918), iniciatinto de famaj Esperanto-"ŝlosiloj" (eble pli bone konata sub la pseŭdonimo "E. Ĉefeĉ" – laŭ angla prononco de komencliteroj H.F.H.), meti spesmilon por praktika uzo por utilo de esperantistoj. En 1907 Höveler fondis en Londono unuan institucion, "La Ĉekbankon Esperantistan". La Ĉekbanko celis unue faciligon de pagoj inter diversnaciaj esperantistoj kaj komercistoj, kaj due, prepari vojon por ĝenerala akcepto kaj enkonduko de internacia monunujo. Ĉiuj sumoj estis en spesmiloj, kies valoroj estis egalaj al 2,0031 anglaj oraj ŝilingoj. Kontoposedantoj pagis unu kaj duonan Sm. por libro de 25 ĉekoj kaj por libro de 50 transpagiloj. Tiu malgranda ŝarĝo kovris koston de presado kaj unu-pencan imposton, kiu estas deviga sur ĉiuj britaj ĉekoj. Ĉekoj estis realigeblaj ĉe ĉiu banko de la mondo en ekvivalentan valoron de anglaj pundoj. Transpagiloj estis realigeblaj nur inter kontoposedantoj kaj ĉekbanko kaj sekve sen postulata imposto.

La unua ĉeko: de de Saussure al Zamenhof

La unua ĉeko, subskribita de s-ro René de Saussure, estis pagebla al s-ro Zamenhof, kiu kvitancis ĝin kaj sendis ĝin al Londono pagebla al s-ro H.B. Mudie.

Ĉeklibrojn internaciajn eldonis en 1908 *Schweizerischer Bankverein*, 43 Lothbury, S.C., kaj Esperanta konsulejo en Genève, Svislando. Nomo de la banko, al kiu ĉeko estis adresota, ne estis presita sur la ĉeko, sed devis esti skribita mane, tiamaniere, ke ĉiu esperantisto povu uzi tiajn ĉekojn, skribante sur ili la nomon de sia banko. Sur ĉeko la sumo estis skribita: entjero antaŭ la signo de spesmilo (Sm.) kaj ĝia frakcio malantaŭe. Por ke sumoj de ĉekoj ne estu falsataj, estis necese, ke oni tiru strekon antaŭ la spesmila sumo ĝis la loko de la unua cifero. Oni ankaŭ esprimu subdividaĵon de spesmilo post la signo *Sm.* ne per spesdekoj, sed tricifere per la plej malgranda unuo, la speso. Elpagota mono de la banko kontraŭ prezentotaj ĉekoj estis la angla ora pundo.



La bildoj prezentas (de supre):
 Poŝtkartan transpagilon de Ĉekbanko Esperantista;
 Spesmilan ĉekon de la sama instanco;
 Paginformon en spesmiloj de firma Ader & Borel.
 Sur paĝo 66 aperas la du flankoj de arĝenta spesmila monero eldonita en 1912 kaj nun en la kolekto de la Biblioteko Hodler de UEA. La moneroj estis vendataj dum la Universala Kongreso en Krakovo. Apud ili: fragmento de reklampoŝtkarto de Ĉekbanko Esperantista.

Historio de spesmilo

(daŭrigo de p. 67)

Transpagilo en granda poŝtkarto kaj postulanta nur poŝtkartmarkon estis samtempe mendo kaj pago. Ricevinto detranĉis kuponojn kaj simple sendis al Londono por depono.

La Ĉekbanko havis tujan sukceson. Multaj aktivaj personoj kaj ĉiu praktika esperantisto, eldonisto, librovendisto kaj organizo havis kontojn ĉe la banko. En la 30a aprilo 1914 estis 730 kontoposedantoj en 320 urboj en 43 diversaj landoj. En Usono estis 36. Oni uzis 20 000 ĉekojn kaj 40 000 transpagilpoŝtkartojn.

La Ĉekbanko Esperantista en Londono eldonis la unuan nomaron de sia klientaro en 1909, de 8 paĝoj; duan nomaron en 1910, 16 paĝoj; trian nomaron en 1910, 16 paĝoj.

La Unua Mondmilito (1914-1918) tre bremsis la bankon. Post morto de la fondinto (1 sep. 1918) ĝi estis likvidita. Dum kelkaj jaroj esperantistoj ĝuis rimarkeblajn kaj malmultekostajn ilojn por fari grandajn aŭ malgrandajn pagojn ekstere. Librokatalogoj, abonoj, membrokotizoj en internaciaj organizaĵoj kaj dum Esperanto-kongresoj, eĉ manĝokartoj en restoracioj estis indikitaj en spesmiloj.

Arĝentaj spesmil-moneroj

Okaze de la dudek-kvina datreveno de publikigo de la unua Esperanto-libro (26 julio 1887), Saussure stampigis arĝentajn monerojn de 1 kaj 2 spesmiloj. Tiuj ĉi moneroj estis vendataj kiel medaloj-memoraĵoj dum la kongreso de Esperanto en Krakovo. Moneroj portis sur fronta flanko la kapon de la Majstro kaj tekston: "D-ro L.L. Zamenhof, aŭtoro de Esperanto" kaj sur la inversa flanko kvinpintan stelon sur ŝildo, sur kiu staras ujeto kun torĉo. La surskribo tekstas: "Jubileo de Esperanto, 1887-1912".

Diametro de la monero estas 30 mm, dikeco 2 mm. Fotografaĵo de 2-spesmil-monero estas presita en franca broŝuro *La monnaie internationale par René de Saussure*, Genève, 1914, sur la unua kovrilpaĝo kaj sur la deka paĝo. Diametro de la fotografaĵo estas 38 mm. Kiu nuntempe en la mondo posedas spesmil-monerojn?

En *Proverbaro Esperanta*, publikigita en 1910 en Paris, Francujo, Zamenhof donis 10 proverbojn kun spesmilo: 1) Fremda spesmilo estas sen utilo, 2) Fremdlando objekton por speso donas, sed por ĝin venigi, oni spesmilon bezonas, 3) Kiu speson ne tenas, tiu al spesmilo ne venas, 4) Li faras princan promeson, sed ne havas eĉ speson, 5) Oni donacas por speso kaj laborigas por spesmilo, 6) Por regna speso ne ekzistas forgeso, 7) Se ĉiu speson donos, malriĉulo malsaton ne konos, 8) Sen speso unua ne ekzistas dua, 9) Spesmilo superflua poŝon ne ŝiras, 10) Spesmilo vojon tratabas.

En la korŝira rakonto *Marta Zamenhof* uzis speson 2 fojojn, spesdekon 21, spescenton 1, spesmilon 29.

VALORA DOKUMENTO GRATULINDA

Recenzas Walerian Włodarczyk (Varsovio):

Pri internacia lingvo — dum jarcentoj. Kompilis Isaj Dratwer. Wembley: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, 1970. 141 p. Ofset. 21 cm. (Serio A/Sekcio VII: Opinioj pri Esperanto — provizora ekstervica eldono.)

Finfine la longedaŭra laborego de la eminenta Esperanto-aganto mag. Isaj Dratwer efektiviĝis.... Ni ricevis la publikaĵon valoregan, ĉiam aktualan kaj nepre necesan *Pri internacia lingvo dum jarcentoj*. Pravigo de la supra konstato estas tre facila tasko. La aŭtoro sur la 112 paĝoj prezentas kronologie en 6 ĉapitroj la kreskadon de la interesiĝo pri la ideo de lingvo internacia kaj nia movado.

El la paĝoj de la publikaĵo aperas eldiroj de entute 208 personoj: filozofoj — 35, verkistoj — 51, sciencistoj — 35, filologoj kaj lingvistoj — 18. Do, diversocianoj montras la neceson de kaj penon por la Internacia Lingvo kaj same pravas la sciencan valoron de Esperanto kaj ĝian praktikan utilecon.

La publikaĵo de CED estas ja kolekto de opini-eldiroj — vera kunekzistado precipe en la ĉapitro "Aliaj", kie dank' al la aŭtoro enmetitaj estas la eldiroj de papoj (6), reĝo kaj reĝino (2), ŝtatprezidantoj (11) kaj aliaj.

La eldoninto tutklare — eĉ jam sur la titolpaĝo — atentigas, ke la nun prezentita publikaĵo estas ja "provizora ekstervica eldono" kaj en la antaŭparolo la legantoj estas petataj "eltrovi la originalajn tekstojn de unuopaj eldiroj en siaj respektivaj lingvoj" kaj ilin sendi al la aŭtoro. La refoje prilaborota publikaĵo, eldonota kun la tekstoj paralele en nacia kaj Esperanta lingvoj ekhavas certe pli sciencan valoron, estos pli utila dokumento.

Tutklare kompreneblas, ke mag. I. Dratwer ne povis enmeti ĉiujn eldirojn, kaj la elekto mem do estis ne tre simpla. Tamen mi ne povas kompreni, kial mankas kelkaj famaj kaj eminentaj nomoj-personoj. Ne pro patriotisma vidpunkto mi substrekas ekzemple la mankon de la opinioj-eldiroj de prof-oj: Z. Klemensiewicz, A. Czubryński, J. Muszyński. Estas ja sciate, ke la unua el ili, la plej eminenta pola lingvosciencisto, de dekoj da jaroj estis tre aktiva kaj fervora Esperanto-aganto, plurfoje per sia scienca aŭtoritateco apogis nin kaj ofte defendis nin antaŭ kontraŭuloj. Krome oni povas rimarki ankaŭ la mankon de opinioj de: Alfons la 8-a, Wilhelm la 2-a, M. Gorkij (de liaj nove eltrovitaj dokumentoj), fragmentoj de enciklopedioj k.a.*

La eldoninto dediĉis sufiĉe grandan atenton al tio, ke la publikaĵo estu bone prezentita. La presarango estas gratulinda. La tuto estas enmetita en konvenan kaj interesan kovrilpaĝon.

Mendu ĉe UEA: 6,— gld. + sendokostoj 10%.

BRAZILO KANTAS POR PLI BONA MONDO

Recenzas Vilmos Benczik (Budapeŝto):

Brazilo kantas por pli bona mondo. Tr. Sylla Chaves. Muzikmajstro: Cipó. Kantas A. Miranda, A. João kaj F. Fenati. La poemojn deklamas kaj parolas la tradukinto. Rio de Janeiro: Kultura Kooperativo de Esperantistoj, 1970. Disko 33 t/m. Duflanka. 30 cm.

Lastatempe salutinde vigligis la produkto-ritmo de diskoj en Esperanto. Oni ne bezonas serĉi argumentojn por pruvi, kigrade tiu fenomeno faciligas la laboron de la respondeculoj pri la grupa programo.

Sur tiu ĉi disko (suma ludtempo estas 33 min.) alternas brazilaj kantoj kaj poeziaĵoj. Inter la kantoj aperas ankaŭ la mondkonata *Ave Maria*, en tre bela prezento. La kantistoj kantas en profesia nivelo, ankaŭ

la tradukoj ŝajnas bonaj. (Bedaŭrinde, oni ne aldonis presitan tekstaron, nur sur la kovrilo estas presitaj kelkaj: en la rapidritmaj kantoj iom malfacilas kapti la vortojn.)

La poeziaĵoj — en la bone prononcita prezento de Sylla Chaves — ŝajnas malpli allogaj, sed certe ankaŭ ili trovos ŝatantojn. La mikslingva propaganda poemeto de Chaves, titolita *Kvin dronintoj* — krom kiu nur 55-sekunda prezento rompas la esperantlingvecon — estas aparte ĉarma kaj sprita.

La disko certe alportos multan plezuron al siaj aĉetantoj.

Mendu ĉe UEA: 16,20 gld. (por nederlandanoj 18,47 gld.) + sendokostoj 10%.


Laste aperis. . .

gravaj novaj eldonaĵoj, precipe belliteraturaj. Kálmán Kalocsay aldonis al siaj traduk-triumfoj du novajn poemarojn: *Libero kaj amo, poemoj elektitaj* de la hungara poeto Sándor Petőfi (eld. Corvina, bd., 260 p., 9,— gld.) kaj — kun Gaston Waringhien — la 380-paĝan volumegon de Stafeto *Kantoj kaj romanoj, poemkolekto* de la glora Heinrich Heine (bd. 21,60; broŝ. 17,28 gld.). En la serio Beletraj Kajeroj de la sama eldonejo Stafeto aperis du novaj originalaj poemaroj: la debuta *Eta vivo* de Clelia Conterno (134 p.) kaj *Humoroj* de William Auld (113 p.). Ambaŭ kostas po 7,20 gld. Pli popularaj estas *Nokto da timo kaj aliaj noveloj* de la nov-zelandano Bertram Potts (79 p., 5,— gld.) kaj *Ni aktoras...3 komedietoj* de Marjorie Boulton — verketoj destinitaj por klub-vesperoj k.s. (36 p., 2,— gld.).

El Ĉeĥoslovakujo alvenis tri novaĵoj: granda novelaro de Karel Čapek *Libro de apokrifoj*, en traduko de Josef Vondroušek (105 p.), legolibreto 46-paĝa de Theodor Kilian *La mondo rakontas; 50 rakontoj el 5 kontinentoj*, kaj la dua kajero de *Junulara kantar-eto* kompilita de Josef Cink (46 p., kun muziknotoj). Prezoj ankoraŭ ne estas konataj. Ankoraŭ du broŝuretoj meritas mencion: *De Z al A en tri epokoj*, multobligita prelego pri Esperanta literaturo de Fay Koppel, kaj *Pacon, Sinjoro!*, religiaj poemoj originalaj kaj tradukitaj de Luigi Minnaja (1,— gld.).

El Hanojo venis *Prezidento Ho Chi Minh (resuma biografio)* (152 p., ilustr.), kaj *Unu jarcento de naciaj luktoj*, historio pri la periodo 1847-1945 (223 p., kun mapo). Alian kontinenton priskribas nova vojaĝrakonto de Tibor Sekelj: *Tra lando de indianoj*. Prezoj: bd. 23,40; broŝ. 18,60 gld. (186 p.). La nove konstruita *Nankina Jangzi-pontego* estas la temo de

Okaze de la UK en Vieno aperis speciala, 88-paĝa numero de 'Norda Prismo', pri la danaj komerco, industrio, navigado kaj turismo. La dana ministerio de eksterlandaj aferoj trovis ĝin tiel bona, ke ĝi mendis represon de mil ekz-oj kun antaŭparolo de la ministro. Tiu interesplena kajero estas senpage mendebla ĉe danaj ambasadoj kaj konsulejoj, aŭ de la Gazetara kaj Informa Departemento de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, Christiansborg, Kopenhago K.



samnoma bildpoŝtkartaro, laste eldonita de Fremdlingva Eldonejo en Pekino.

Riĉiĝis ankaŭ la priesperanta parto de la literaturo. En Japanujo aperis nova, parte tralaborita eldono de *Lingvo Stilo Formo* de Kalocsay, kies antaŭa fotorepreso tre bone vendiĝis (5,50 gld., 160 p.). Senŝanĝe represita estas la sukcesa legolibro de William Auld *Paŝoj al plena posedo* (239 p., 7,20 gld.). Ĝi estis fotopresita en Prago, dum en la alia duono de Ĉeĥoslovakujo aperis tri novaĵoj: *Esperanta-slovaka kaj slovaka-Esperanta vortaro* de Š.R. Seemann, 834 p., *Esperanto do vrecka*, frazlibro de Sandanyho-Šaturová, 226 p., kaj *Rozhlasový kurz esperanta pre začiatčníkov* (Radia kurso por komencantoj), 25 lecionfolioj de Radio Bratislava po 4 paĝoj. La aliajn du verkojn eldonis la Slovaka Pedagogia Eldonejo. Rüdiger Eichholz (Kanado) eldonis la trian ĝeneralan serion kaj la unuan specialan (kemi-fizikan) serion de slipoj por la *Slipara vortaro* ilustrita, kiu servas kiel prepara ŝtupo al eldono de la bildvortaro Duden. La sliparo estas abonebla. *La struvelpetro, beletaj rakontoj kaj komikaj bildoj* de Heinrich Hoffmann, estas klasikaĵo de germana infanliteraturo. La duan eldonon je 16,— gld., kolorilustrita, produktis eldonejo TK. Laste: BEA en Londono eldonis novan 32-paĝan informbroŝuron de sia prezidanto B. Cavanagh, *A first foreign language for all mankind* (Unua fremda lingvo por la tuta homaro).

* Pro ekonomiaj kaŭzoj CED devis limigi la elekton el la abunda materialo kolektita de mag. Dratwer. La ellaso de prof. Klemensiewicz okazis dum la redaktado en la Centra Oficejo. (Noto de la redakcio.)

la problemo de

Multaj el ni volonte forlasus niajn plenŝtopitajn urbojn por vivi malproksime de la trafika bruego.

Tamen, ankaŭ soleco estigas problemojn: izoliteco, aŭ malsaniĝo, kiam medicina helpo estas malproksima.


Telekomunikado-sistemoj de Philips helpas solvi tiujn problemojn; homoj en izolitaj lokoj povas interkomunikiĝi telefone aŭ telegrafe.

Radio kaj televido alportas distron kaj informojn en plej forajn hejmojn.

Ankaŭ en malsanulejoj servas Philips. Radio kaj televido - aŭ telefona konversacio - helpas alproksimigi la eksteran mondon, dum X-radiaj kaj medicinaj aparatoj de Philips ebligas al la kuracisto efektivigi pli rapidan resaniĝon kaj revicigi en la laborproceson multajn, kiuj alie, eble, estus restintaj invalidaj.

Esperantlingva katalogo priskribanta la modernan programon de Philips en X- radiaj kaj medicinaj aparatoj estos baldaŭ havebla. (Philips Medical Systems Division, Eindhoven - Holland)

Elektroniko helpas konstrui mondon pli feliĉan kaj pli sanan.



La "EVOLUON" en Eindhoven, Nederlando, estas konstanta ekspozicio, kiu montras la disvolviĝon de scienco kaj socio. Ĝi estis konstruita por memorigi la 75-an datrevenon de la fondiĝo de Philips.

PHILIPS



e soleco

LOKE - FAKE - PERSONE

Aperas bonaj aŭguroj por refortiĝo de la Esperanto-movado en Argentino. La gazeto 'Argentina Esperantisto' aperas presite, en pli granda formato. Kaj la organizantoj komprenas, ke por kreskigi la membro-nombron necesas unue kreskigi la nombron de lernantoj. Jen la aspekto de pli-ol-plena somera kurso ĉe Asocio Buenos Aires de Esperanto — nur unu el 5 tiaj kursoj nuntempe funkciantaj.



LOKE

Ĉeĥoslovakujo

- La esperantistoj de ambaŭ partoj de Ĉeĥoslovakujo amike renkontiĝos en Vsetín de la 24a ĝis la 27a de septembro 1971. Okazos krom la laborkunsidoj oratora kaj deklama konkursoj, promenado, plenkunsido de ambaŭ organizaĵoj ĈEA kaj AESSR, filmprezentado, prelegoj ktp.

Eŭropo

- Okazos en Aachen, F.R. Germanujo, Trilanda Esperanto - Renkontiĝo (belga-germana-nederlanda) laŭ invito de Esperantista Rondo Aachen, en la 16a de majo 1971. Informoj haveblaj ĉe s-ro Paul Firmenich, Jahnstr. 5, D 519 Stolberg, F.R. Germanujo.

Francujo

- La Internacia Florekspozicio (*Floralies Internationales*), okazonta de la 23a de aprilo ĝis la 6a de majo 1971, havos konstantan Esperanto-interpretiston. (Adreso: Commissariat Général des Floralies Internationales, F-44-Nantes.)

Grekujo

- En Ateno okazos de la 14a ĝis la 21a de julio 1971 "Akropolo '71", kiun organizas la junulara sekcio de Helena Esperanto-Asocio. Oni debatos pri lingvaj problemoj, vizitos atenajn ĉirkaŭaĵojn kaj muzeojn kaj ekskursos al Mycene.
- En la lando, kie estis nur relative malforta movado, ekĝermis juna forto. En Thessaloniki kun pli ol 600 mil enloĝantoj okazas nun Esperanto-kurso, kiun gvidas s-ro Ioanis Kotitsas, direktoro de la Greka Pedagogia Akademio. Kvin el la 35 kursanoj estas universitataj studentoj kaj la ceteraj estas studentoj de la Akademio.

Hispanujo

- Okaze de la 23a renkontiĝo de esperantistoj en la provinco Barcelono en la 20a de junio, la aŭtoritatoj

en San Cugat del Vallès inaŭguros la straton Esperanto.

Hungarujo

- La Scienca Studrondo de Esperanto ĉe la Budapeŝta Universitato aranĝas konkurson. Iu ajn povas partopreni ĝin, sendante al "KISz — Scienca Studrondo de Esperanto" (Universitato Eötvös L., Budapeŝt V, Pesti B.1.-3.) ellaboraĵon pri unu el la tri temoj: 1) Ĉu esperantismo estas politiko? 2) Ĉu esperantismo havas propran ideologion? 3) Ĉu Kabe pravis — pri la vivraĵo de originala Esperanto-literaturo? (Limdato: la 21a de aprilo 1971. Konkursaĵoj premiotaj.)

Norvegujo

- La studenta unuiĝo de la Universitato de Oslo lastatempe faris rezolucion, ke oni enkonduku Esperanton ankaŭ en ilian Universitaton. Tion raportis fama norvega ĵurnalo *Aftenposten* (4 jan. 1971).
- En la samtaga numero de la supre menciita ĵurnalo aperis artikolo, proksimume duonpaĝa, "Esperanto kiel lingvo por tekniko kaj scienco", verkita de Thor Magnus Carlsen, kiu favore informas pri la nunaj pozicio kaj funkcio de Esperanto. En postaj numeroj de la sama ĵurnalo aperis leteroj reagaj.

Pollando

- En Vroclavo okazos la 7a Internacia Esperantista Ferio-restado de la 17a ĝis la 30a de septembro 1971. Dum la pasintaj 6 jaroj partoprenis ĝin sume pli ol 1500 personoj el 18 landoj. Inter la programeroj troviĝas prezentado de muzikensemblo "Muzilo", koncertoj, ĉirkaŭfajra amuziĝo, noktomeza renkontiĝo kun diablo...ktp. Informojn donas PEA-filio en Vroclavo, poŝtkesto 16, Wrocław 17, Pollando.

PERSONE

Ciccanti

- Itala pastro Albino Ciccanti, delegito de UEA en



Rimini, dum sia dumonata vizito al Aŭstralio en la fino de la jaro 1970, plene utiligis diversajn ŝancojn per kaj por la Internacia Lingvo, precipe en katolikaj lernejoj. Pluraj ĵurnaloj raportis pri li kaj pri lia agado.

FAKE

Belarto

- Centro de Esperanto Sabadell en Hispanujo (Gral. Mola 99, Sabadell), kunlabore kun loka Ŝparkaso okaze de la Universala Tago de la Ŝparo, okazigos konkurson de desegnaĵoj fare de infanoj de 4 ĝis 12 jaroj, en oktobro 1971. Oni povas sendi ĝis la 30a de aŭgusto pentraĵojn (formato: 21 x 29 cm) pri liberaj temoj.

Espermenso

- "Espermenso", kiu estas esperantista fako de la internacia organizaĵo "Mensa" kaj fŭka organizaĵo kunlaboranta kun UEA, lastatempe eldonis informilon pri Esperanto en 3 lingvoj (Esperanta, angla, franca) ankaŭ por neesperantistaj "Mensa"-anoj. Informoj akireblaj ĉe: Box 2514 Station D, Ottawa, Ont., Kanado.

Hipioj

- Nederlanda hopia gazeto *Fox*, supozeble legata de miloj da junuloj, estas redaktata de kolombiano, kiu parolas Esperanton. Lastatempe aperis en ĝi artikolo pri "komuna lingvo", en kiu Esperanto kaj UEA estas favore menciitaj.

Lingvistiko

- En la revuo *Pensiero e linguaggio in operazioni* (Penso kaj lingvo en operacioj) aperis en la lingvoj itala kaj angla nova grava studo de la soveta lingvisto V.P. Grigorev pri "Kelkaj problemoj de interlingvistiko", en vol. 2, n-ro 5. La artikolo favore pritraktas Esperanton kaj konkludas, ke la problemon de internacia komunikado povas solvi nur "artefarita helpa" internacia lingvo — iaspeca lingva "sputniko".

"Miela luno"

- Ankaŭ ĉi-jare okazos la famiĝinta "Miela luno en Rimini", konkurso por junaj geedzoj, de la 26a de majo ĝis la 8a de junio. Lastatempe en ĝian regularon oni aldonis noton, ke "apartan premion gajnos tiu paro, kiu montros la plej bonan konon de la lingvo Esperanto." (Organizas la turisma entrepreno kaj la Asocio de Hotelestroj. Informas la UEA-delegito en Rimini.)

Muziko

- Rezulte de la informado pri la pasintjara Universala Kongreso en Vieno, la entrepreno *International Contact Company*, kiu lanĉas novajn modkantojn de konataj kantistoj, proponis al Germana Esperanto-Asocio, ke la germana diskofirmao *Edition Montana* produktu diskon kun 2-4 kantoj en la Internacia Lingvo kantitaj de Udo Jürgens, kondiĉe ke la Esperanto-movado transprenu minimume 10 000 diskojn. La vendoprezento de la disko estos 5 germanaj markoj (5 gld.). La mendilojn oni povas peti de Libroservo Pickel, Postfach 2113, D 85 Nürnberg 2, F.R. Germanujo.

Pupteatro

- La pupteatra grupo de Gano interesiĝis pri la Pup-

teatra Internacia Festivalo okazonta ankaŭ ĉi-jare en Zagrebo, Jugoslavio. (Pri la pasintjara Festivalo oni povas legi en n-ro 781 de *Esperanto*.) S-ro Bernard Golden, dumviva membro de UEA en Gano, nun tradukas teatraĵon kaj instruas la Internacian Lingvon al ganaj pupistoj.

Reklamado

- Lastatempe aperis en Svedujo la unua numero de *North star / La norda stelo / Nordstjärnan*, malgrandformata 12-paĝa broŝureto, kiu enhavas divers-specajn reklamojn en diversaj lingvoj. De libraj anoncoj ĝis Esperanto-radioelsendoj, de la sveda, angla lingvoj ĝis la rusa, Esperanto.... Cetere "korespond-kaj interŝanĝanoncetoj en Esperanto aperos senkos-te", dum por la anoncoj en la aliaj lingvoj oni devas pagi. (Redakcia adreso: K. Erik Eriksson, Box 930, S 260 70 Ljungbyhed.)

Skoltoj

- Skolta Esperanto-Ligo nun planas okazigi Skoltan Tendaron en Eŭropo en 1972, okaze de la "Jaro de internacia amikeco por eŭropaj skoltoj", en kiu Esperanto estu unu el la oficialaj lingvoj.
- De la 25a de julio ĝis la 15a de aŭgusto 1971 okazos Skolta Vaga Esperanto-Tendaro en Pollando, kiun organizas Pola Skolta Asocio. La partopreno ankaŭ de nepolaj gejunuloj 15-18-jaraj estas atendata. Interesitoj skribu al: s-ro A. Grzębowski, Bydgoszcz 9, M. Curie-Skłodowskiej 10/3, Pollando.

"Ŝajnase"

Skribas Hector Boffejon (Belgujo):

Ŝajnas al mi, ke la respondo al C.M. Houghton (*Esperanto*, n-ro 783, feb. 1971) estas erara.

Estas vere, ke laŭ *Plena gramatiko* (2-a tralaborita eld. 1939, par. 297, p. 325) la adjektiva formo estas preferinda post "ŝajnas" en frazoj kiel "eble ŝajnos stranga, ke...".

Tamen, laŭ la sama P.G. (sama eld., par. 360, p. 398), se la subjekto de "ŝajnas" estas subpropozicio, la predikativo estas adverba: "estas (aŭ "ŝajnas esti", aŭ "ŝajnas") ĝojinde, ke li venis", "estas (aŭ "ŝajnas esti", aŭ "ŝajnas") domaĝe, ke la bela plano fiaskis".

La par. 297 estas eble nur provo pravigi la zamenhofan esprimon "eble ŝajnos stranga, ke...", en kiu, miaopinie, Zamenhof tamen akordigis la predikativon kun la (intence) ellasita demonstrativo "tio": "Eble ŝajnos stranga tio, ke...", aŭ "eble tio ŝajnos stranga, ke...".

Cetere, en la frazo, kritikita de C.M. Houghton, la subjekto de "ŝajnas" estas *ne* la subpropozicio "ke...", sed la infinitivo "emfazi" kaj en tiu kazo oni uzu adverban predikativon (sama eld., par. 297, 1. Rim. I, p. 324): "resti kun leono estas danĝere"; do ankaŭ: "resti kun leono ŝajnas (esti) danĝere". Al mi ŝajnas do, ke en la kritikita frazo la predikativo devas esti adverba: "ŝajnas utile emfazi, ke...".

56-a UNIVERSALA KONGRESO

Oficiala komuniko

Unuafoje
ŝtata fervoja
instanco presigis en
Esperanto — proprakoste —
la oficialajn rabatilojn, per kiuj
kongresanoj povas vojaĝi malmultekoste
tra difinitaj landoj survoje al la kongresa urbo.
Detaloj aperas en la Oficiala Bulteno, jam eldonita.

Aperis "Oficiala Bulteno" (dua)

Al ĉiuj aliĝintoj estas sendita 48-paĝa Oficiala Bulteno de la Kongreso. Ĝi prezentas enhavriĉan rikolton de ĝeneralaj kaj specialigitaj informoj pri la programo, loĝiga kaj ekskursaj servoj, postkongresaj aranĝoj, mendiloj, kaj multaj aliaj. La tekstojn agrable akompanas deko da anoncoj kaj proksimume tri-deko da fotografiaĵoj kaj ilustraĵoj.

Brita gazetaro kaj radio interesiĝas

Kontraste al onia atendo, la unua gazetara konferenco pri la 56-a UK estis vera sukceso. Ĝi okazis la 17-an de februaro 1971 en la oficejo de Brita Esperantista Asocio okaze de la vizito de KKS Mikuláš Nevan al Londono. La konferencon partoprenis 14 reprezentantoj-ĵurnalistoj, senditoj de la plej grandaj kaj influhavaj ĵurnaloj kaj gazetoj, presagentejoj kaj radio BBC. En la diskuto parolis d-roj Wells kaj Lapenna, s-roj Holmes, Platt kaj I. Fantom. Aperis kelkaj artikoloj kaj disaŭdiĝis sep apartaj intervjuoj (i.a. por Afriko kaj Latinameriko), unu eĉ per la televido.

Alia grava sukceso

Por la unua fojo en la historio, nacia fervoja direkto presigis kaj mem financis (!) la fervojrabatilojn en Esperanto. Tiun ĉi atingiĝon ĉe la Brita Fervojo oni dankas al la fervora sekretario de la LKK s-ro Geoffrey Wood.

Tagmanĝoj en la kongresejo

Moderna kaj oportuna studenta manĝejo en *University College* (la kongresejo) proponas varmajn tagmanĝojn al la kongresanoj, sed nur surbaze de antaŭmendo. La antaŭviditaj menuoj kaj prezoj estas publicitaj en la Oficiala Bulteno.

Decimaligo de la brita mono

La 15-an de februaro 1971 Britujo transiris de la malnova monsisistemo al tute decimala sistemo. Ne plu bezonos eksterlandaj vizitantoj lerni la aritmetikon de malnovaj pencoj, ŝilingoj, duon-kronoj, pundoj kaj gineoj. Ĉio fariĝis tre simpla: cent novaj pencoj konsistigas unu pundon, kies valoro restas senŝanĝa. Tio multe faciligos al la kongresanoj butikumadon, pagojn en restoracioj, hoteloj k.s.

Voksignalo GB3ESP

Radioamatoraj sendstacioj de s-ro Ken Sly, G4MR, kaj s-ro Walter Farrar, G3ESP, funkciigos la kongresan elsendilon kun voksigno GB3ESP. Kunlaborantoj kaj etero-amikoj kontaktu al s-ro Sly, 200 Nevells Road, Letchworth, Herts., Britujo.

Internacia Vespero de Esperantaj Kantoj kaj Kanzonoj

Ekstertradicia fariĝos la programo de Internacia Arta Vespero en Londono. Sub la nova titolo ĝi strebos doni la plezuron de klasika kaj moderna ritmoj kaj la ĉarmon de Esperantaj kantoj kaj kanzonoj plenumitaj de diversnaciaj gekantistoj. Inter la prezentistoj aperos Ramona van Dalsem, duopo Karagjosov-Angelova, Mišo Zdravev, Sirkka Lehtivaara kaj aliaj famaj nomoj.

Aŭtora Horo

Reenkondukita estos la programo Aŭtora Horo, dum kiu la Libroservo de la Kongreso organizos pramanan subskribadon de verkoj fare de la aŭtoroj aŭ tradukintoj. Oni atendas ĉeeston de multaj eminentaj personoj, i.a. de britaj aŭtoroj William Auld, Marjorie Boulton, Reto Rossetti, Ivo Lapenna, John C. Wells, Raif Markarian, Victor Sadler, J.H. Sullivan kaj aliaj.

Gvidfolioj pri Londono


Turisman flugfolion kun utila mapo de Londono provizos por ĉiu kongresano la Brita Turisma Instanco. Ĝin akompanas la traduko en Esperanto. Alia eldonaĵo — krom la jam pli frue anoncita libreto "Jen Londono" — estas reklama kaj informa folio de Londona Transport-Instituto.

Statistiko de la 12-a Internacia Infankongreseto (3 marto 1971)

Belujo 3, Britujo 25, Francujo 7, Norvegujo 2. Entute 37 geknaboj el 4 landoj.

Statistiko de la 56-a Universala Kongreso (3 marto 1971)

Entute aliĝis 1131 personoj el 34 landoj.



"La tuta amplekso de la sciencoj – t.e. la nombroj kaj kvantoj de la sciencistoj, disertaĵoj, atingiĝoj ktp. – duobligas en po 15 jaroj." Tiel iu sciencisto indice taksis la rapidecon de la scienca evoluo.

De post tiam, kiam Lindberg flugis inter Novjorko kaj Parizo en 33,5 horoj, pasis nur 44 jaroj ĝis nun. Oni prognozas, ke en malpli ol 10 jaroj efektiviĝos la transportado per aviadilegoj kun po mil pasaĝeroj, ke en la 1980-aj jaroj estos eblo flugi je 5 maĥoj (maĥo = sonrapido), kaj ke en la 1990-aj jaroj oni povos flugi per raketa pasaĝeraviadilo je 8 maĥoj, ekz-e inter Parizo kaj Tokio en proksimume unu horo. Tio signifas, ke en duona tago oni povos unu-du fojojn ĉirkaŭflugi la terglobon.

Ankaŭ surtere estos evoluo. Nuntempe en la kadro de UN estas plano konstrui trakurfervojon de Turkio ĝis Indonezio tra i.a. Irako, Afgano, Hindujo, Birmujo. En la jaro 1980, laŭ la nuna plano, per internacia vagonaro oni povos vojaĝi de Eŭropo ĝis Birmujo sen interrompo.

La evoluo en la kosmo estas jam tiel konata, ke ne necesas speciale mencii ĝin. Ne sole la rapidan evoluon de la spacveturado, oni vidos ankaŭ en sia hejmo eĉ propraokule la sciencan evoluon: baldaŭ efektiviĝos la ĉiutaga tutmonda televida elsendado pere de satelitoj, tuja elsendado de krudaj kaj freŝaj novaĵoj el diversaj mondopartoj al la tuta mondo.

Ĉio ĉi en la epoko de la scienca kaj teknika evoluo, precipe en la vasta kaj amasa komunikado, sendube bezonigas al la homaro la Internacian Lingvon.

Kvankam la homoj apenaŭ povas vivi sen lingvoj, ili ĝenerale ne bone rimarkas la lingvajn problemojn. Ekz-e, serioza traktaĵo pri la vasta komunikado lastatempe eldonita de la Departemento pri Vasta Komunikado de Unesko ne mencias ilin eĉ per unu sola linio, kvankam ĝi traktas la internacian kulturan kunlaboron.

Kun celo havi konvinkajn, inspirajn, kreajn aŭ utilajn eseojn por la Esperanto-movado, la redakcio de "Esperanto" okazigas ese-konkurson.

Temo: "Scienca evoluo kaj la jaro 2000"

Limdato: La 30-a de septembro 1971

Manuskripto: Tajpu sur unu flanko de blanka papero kun duobla interlinia spaco. Sendu ĝin en du ekzempleroj. La amplekso estu maksimume 150 linioj, po 50 literspacoj por unu linio.

Premioj: Unu el la jenaj libroj al ĉiu eseo alprenita por publikigo en "Esperanto". (La redakcio principe ne limigas la nombron de la alprenotaj eseoj.) Oni mencienu en sia eseo unu titolon el la jena listo por eventuala premiigo.

Kondiĉoj: Oni aldonu, al sia manuskripto, siajn nomon, adreson, aĝon, profesion/studentecon, sekson. La manuskriptoj ne estos resenditaj.

Sciencaj studoj *Dia komedio*
Unesteno *Nobla korano*
Struvelpetro *Biblio*



ESPERANTO EN RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F 75 Paris 16, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1970, Unua Parto, p. 488. Mallongigoj: I = Informoj; P = Parolado; K = Kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Warszawa, 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 48.90 m (6135 kcs), 41.18 m (7285 kcs). I. P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtokesto 46, Warszawa, Pollando.

15.30-16.00 Warszawa, 31.45 m (9540 kcs), 25.34 m (11840 kcs), 19.64 m (15275 kcs).

Dimanĉe

11.00-11.30 Pekino, 47.69 m (6290 kcs), 40 m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.

11.00-12.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs). I. K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento, Sorocaba (São Paulo), Brazilo.

11.30-12.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.

12.30-13.00 Pekino, 25.12 m (11945 kcs), 19.89 m (15080 kcs). I.

18.00-19.00 Sherbrooke, 102.7 Mcs (mod. frekv.). I. Le Globe Trotter, Radiostacio CHLT, 3330 ouest rue King, Sherbrooke (Québec), Kanado. (Kvarlingva programo pri turismo.)

20.00-20.20 Roma, 50.08 m (5990 kcs), 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, I-00100 Roma, Italujo.

20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.

22.45-23.00 Valencia, 358 m (836 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs). I. K.

09.45-10.00 Bratislava, 68.72 Mcs (mod. frekv.). K. Radio Bratislava, Leninplaco 13a, Bratislava 1 Ĉeĥoslovakio.

12.15-12.25 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 19.44 m (15430 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (d-ro A. Baur), Svisa Radio, SOC, Ch-3000 Bern 16, Svislando.

18.15-18.30 Stoke-on-Trent, 94.9 Mcs (mod. frekv.). K. I. Radio Stoke, Cheapside, Hanley, Stoke-on-Trent (Staffs.), Britujo. (Kelkaj programoj en la angla.)

Merkrede

12.15-12.25 Bern, kiel lunde. (s-ro Gacond.)

13.00-13.15 Wien, 203 m (1475 kcs). P. Radio Wien, Esperanto-elsendo, Argentinierstr. 30a, A 1041 Wien, Aŭstrujo. (Ĉiun kvaran sinsekvon merkredon.)

Ĵaŭde

21.45-21.55 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 31.28 m (9590

kcs), 25.60 m (11720 kcs), 25.28 m (11865 kcs), 19.60 m (15305 kcs). P. (d-ro Baur.)

23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1163 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavio.

Vendrede

09.45-10.00 Bratislava, kiel lunde.

16.15-16.30 Bratislava, kiel lunde.

18.30-19.00 Clermont-Ferrand, 90.4 (mod. frekv.). K. Centre de Télé-enseignement de la Faculté des Lettres, 29 bd. Gergovia, F 63 Clermont-Ferrand, Francujo

20.00-20.30 Pekino, 48 m, 45 m, 42 m, 38 m.

21.40-22.00 Tallinn, 290 m (1034 kcs), 49.30 m (6085 kcs). I. Eesti Raadio, Esperanto, Poŝtokesto 402, Tallinn, Sovetunio. (Nur la antaŭlastan vendredon de ĉiu monato.)

23.40-23.50 Gdańsk, 1322 m (227 kcs), 278 m (1079 kcs), 230 m (1304 kcs). P. Pola Radio, Esperanto-fako, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando. (Ĉiun alternan vendredon.)

Sabate

07.30-07.45 Bratislava, kiel lunde.

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-12.40 Gdańsk, 49 m, 48 m, 41 m, 31 m, 19 m kaj 66.29 Mcs (mod. frekv.). Ripeto de la vendreda programo.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.

14.30-14.40 Rosario, 229 m (1310 kcs). P. Radio Nacional, Córdoba 1331, Rosario (Santa Fé), Argentino.

20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.

21.45-21.55 Bern, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond).

USONA RADIO en Columbus (Ohio) kvin tagojn ĉiusemajne dissendas kurson dum 15 minutoj: stacio WOSU-AM de la ŝtata universitato de Ohio kaj stacio WCBE-FM de la urba lerneja konsilantaro de Columbus.

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncitan ĉiutagan programon prezentas "Anguleton por Esperantistoj" dum la jenaj nacilingvaj programoj: — dana dimanĉe inter 15.30 kaj 16.00 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 48.90 m (6135 kcs), 42.11 m (7125 kcs); — germana ĉiutage escepte de dimanĉe inter 12.00 kaj 12.30 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 48.90 m (6135 kcs), 31.50 m (9525 kcs), 25.39 m (11815 kcs); — sveda marde inter 16.00 kaj 16.30, 18.00 kaj 18.30, 21.00 kaj 21.30 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 48.90 m (6135 kcs).

La anguletoj en la germanaj elsendoj estas 5-minutaj; la anguletoj en la svedaj kaj danaj elsendoj estas 3-minutaj. Ili estas aŭdigataj ĉe la fino de la koncerna duonhora elsendo.



TEJO

TEJO-redaktoro: Wim Jansen, Röntgenstraat 32 A, Vlaardingen, Nederlando

Entreprenema sekcio

Prilumo de la agadoj de Esperanta Junularo de Nov-Zelando (EJANZ) signifas por la redaktoro de tiu ĉi paĝo lian plej longan ĝisnunan — surpaperan — vojaĝon. Ja la duonan periferion de la terglobo necesas trakuri por ligi la redaktolokon de la TEJO-paĝo kun la geografie antipoda sekcio de TEJO, kiu meritas nian daŭran atenton malgraŭ — aŭ ĝuste pro — sia foreco.

En la EJANZ-jarraporto iom elstaras la relativa izolo, en kiu la insula situo emas teni la asocion. Krom la koresponda interrilatado, la kontaktoj kun alilandaj TEJO-sekcioj (precipe la japana) praktike limiĝas al personaj vojaĝoj. Plibonigante la alfluigon de TEJO-dokumentoj, kaj starigante interŝanĝon de gazetoj, broŝuroj ktp., EJANZ intencas plifirmigi siajn rilatojn kun aliaj Sekcioj de TEJO.

Plej aktivis EJANZ sur la eldona kampo. Ĝia oficiala dumonata gazeto "Junularo" plenumis sian kvinan jaron; menciinde estas, ke el la jaramplekso de 68 paĝoj dediĉiĝis al lernejoj 22 kun varia enhavo. Kvankam okazaj eldonaĵoj plue substrekas la aktivecon de EJANZ sur tiu ĉi kampo, plej atentindas "Lerta Leganto", duonjara porlerneja gazeto, enhavanta rakontojn, teatraĵojn, ekzercojn, ktp., strikte gradigitajn leksike kaj gramatike por akompani al "Secondary School Esperanto" de Markarian kaj Sullivan. "Lerta Leganto" vendiĝis ankaŭ al Aŭstralio kaj Japanujo. EJANZ flegas la ideon, ke daŭra kunvenigo de ĝiaj membroj en bonetosajn "okazaĵojn" kreas la ĝustan spiriton por certigi la estontecon de la organizaĵo. La unua tia okazaĵo en 1970 estis la Unua Tendaro, en Shearers Quarters, kiun partoprenis 18. Intertempe aranĝiĝis ankaŭ la Dua Tendaro, pri kiu vi trovu raporton ĉi-apude. Tion, ke EJANZ-anoj multimas entrepreni longajn vojaĝojn, atestas la 200-mejla veturo de Christchurch-anoj al Dunedin por komuna semajnfino, kaj la samlonga krosado de Wellington-aj EJANZ-membroj, kiuj vizitis dumvoje i.a. izolitajn klubojn. W.J.

La Esperanta Junulara Asocio de Nov-Zelando (EJANZ) okazigis sian duan tendumadon de la 31-a de decembro 1970 ĝis la 6-a de januaro 1971. Ĝi okazis en neuzata farmdomo ĉe Awahou South, 26 km for de Palmerston North. Nia unua tendaro estis tiel sukcesa, ke dek du el la nunaj ĉeestantoj estis jam spertuloj. Inter la novuloj troviĝis tri junulinoj, kiuj gajnis la premiojn ĉe lerneja ekzameno en Esperanto kontraŭ ducent kvindek aliaj kandidatoj. La premio konsistis en senpaga ĉeesto de nia tendaro.

Regule ni okazigis lingvajn sesiojn en malgrandaj grupoj je diversaj niveloj; forte kontribuis al tiuj sesioj preparitaj kaj nepreparitaj paroladoj de ĉiuj, diskutoj, teatraĵoj, kantado kaj interparoloj en plej diversaj nekredeblaj cirkonstancoj. Dum la tendaro ni esploris kavernojn, promenegis, naĝis, manĝis ekstere, dancis, desegnis, pot-faris, kaj mem kuiris kaj fumajis manĝaĵojn. La novuloj multon lernis kaj rapide amikiĝis en nia rondo. Pro la alveno de ciklono Rosie, la lastaj tagoj de la tendaro estis iom konfuzaj. Unu nokton grupo restis en la loka lernejo, kantante dum la tuta nokto.

Per simpla ruzo (fruigo de ĉiu horloĝo po unu horo) ni sukcesis forsendi la aŭtojn sufiĉe frue por atingi la 36-an Nov-Zelandan Kongreson de Esperanto en Auckland, 560 km for. Tie la gejunuloj okazigis la 6-an EJANZ-kongreson kaj vigle partoprenis la plenaĝulan kongreson. Nia prezidanto parolis dum kvin minutoj ĉe la malfermo, ni partoprenis la koncerton, dramon, oratoran, debatan kaj literaturan kunsidojn. Ni ĉeestis la lingvajn sesiojn de Tibor Sekelj, kiu vizitis la kongreson. Ni ankaŭ prezentis al la plenaĝuloj la "EJANZ-horon", kiu estas programo de kantado, teatraĵoj, marionetprezento kaj paroladetoj. Niaj tendumado kaj kongreso vere plifortigis nian rondon kaj movadon. Ni pripensas aranĝon de tria tendumado fine de tiu ĉi jaro.

Patrick Jordan

EL MOZAMBIKO

La membro de Afrika Komisiono de TEJO en Mozambiko malfermis novan kurson de Esperanto al gejunuloj, la 4an de decembro 1970 ĉe "Casa das Beiras". El la 14 enskribintoj 12 estas gestudentoj.

La kurson por progresantoj partoprenas 9 gekursanoj; 7 el ili estas studentoj.



Pli ol 2 600 gld. per kolektado de poŝtmarkoj



La kolektado kaj disvendo de poŝtmarkoj por UEA havigis al la Asocio dum 1970 pli ol 2 600 guldenojn — tio estas proksimume unu procento de la tuta enspezo el ĉiuj fontoj. Tiun bonegan rezulton ni dankas al tiu parto de la membraro — ankoraŭ nur malgranda parto — kiu daŭre kontribuas per sendado de poŝtmarkoj al la komisiito de UEA, s-ro Peter Zacho.

El 26 landoj, kiuj kontribuis en 1970, la unuan lokon laŭ la valoro de la poŝtmarkoj havis Usono, la duan Japanujo (sole Oomoto), la trian Svedujo, la kvaran FR Germanujo, la kvinan Britujo kaj la sesan Nov-Zelando. Laŭ la nombro de poŝtmarkoj kolektitaj la unuan lokon havas ĉiujare Svedujo. Oni demandas sin, kial neniam venas poŝtmarkoj el Irlando kaj nur malofte el Islando. Tiuj du landoj havas la plej valorajn poŝtmarkojn de la mondo.

Entute proksimume 100 personoj sendis aŭ peris la sendon al s-ro Zacho. Se ĉiuj membroj same kontribuas, la Asocio povus disponi ĉiujare 100 000 gld.!

La tutan laboron de ordigado kaj disvendo de la ricevataj poŝtmarkoj s-ro Zacho faras libervole, fideinde kaj akurate, sen ia rekompenco. Li tenas ĉe si kartotekon pri senescepte ĉiuj personoj, kiuj kontribuis tra la jaroj, kaj notas, kiom da mono rezultis el la vendo de iliaj poŝtmarkoj. Tio estas vere granda laboro, kaj estas kompreneble, ke s-ro Zacho ne povas krome korespondadi kun ĉiuj kontribuantoj. La unuan leteron li tamen ĉiam respondas.

Ankaŭ la Centra Oficejo en Rotterdam, memkompreneble, kolektas de siaj korespondantoj la poŝtmarkojn kaj plusendas ilin al s-ro Zacho. Tiel ĝi mem kontribuas dekmilojn da poŝtmarkoj jare. Kiam vi mem skribas al la Centra Oficejo, uzu tiam prefere nur unu markon, la plej altan valoron de serio, anstataŭ pluraj malpli valoraj.

Ni kore dankas al ĉiuj sendintoj de poŝtmarkoj kaj precipe al la ĉi-sube listigitaj, kiuj plej multe sendis. Ili ricevas donacan karton de UEA kiel modestan signon de aprezo.

1. S-ro N. Agnar Haldan, Kalifornio, Usono.
2. Oomoto, Kameoka, Japanujo.
3. S-ino Ernest Franseen, Oregon City, Usono.
4. S-ro B. Rajšić, Beograd, Jugoslavio.
5. Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (s-ino Aagaard).

OFICIALA INFO

N-ro 444, 1 marto 1971

KORAN DANKON!

al s-ino Dorothy Henderson (Kanado), kiu jam de pluraj jaroj subtenas la laboron de UEA per la malavara donaco de mil kanadaj dolaroj jare (nuntempe 3 500 guldenoj). La plej nova donaco de s-ino Henderson (kiu cetere donacis ankaŭ la monon por la Kanada Ĉambro en la Domo de UEA kaj ĝian tutan meblaron) alvenis kvazaŭ novjara saluto tuj antaŭ la jarkomenco.

De post la decido de la Komitato en Helsinki en 1969, donacoj de pli ol mil guldenoj ne iras en la ordinaran kason de UEA, sed rekte al la Asocia Kapitalo.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de junio neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Brazilo: C.V. Tanhott (FD), Bagé; M.L. Bilot (FD), Campos; L. Brieger (FD), N. Manso (FD), C. Doin (FD), J. Manso (FD), Rio de Janeiro; D. Estrêlla Maia (D, FD), São José do Rio Preto; C. Prates Castanho (FD), São Paulo. **Bulgarujo:** B. Simeonov (FD), Sofia. **Danlando:** E.H. Olsen (FD), Næstved; W.F. Pilger (VD, FD), Odense; **Finnlando:** A. Hyninen (D), Korso; A. Romonen (VD), Kuopio; S. Tella (FD), Imatra. **Francujo:** H. Philippe (D), Arras; S. Amariglio (D), Bourg-la-Reine; J.-P. Boulet (FD), Cournon d'Auvergne; P. Bariteaud (D), Grasse; C.S. Nourmont (D, JD, FD), Melun; L.-A. Baudat (D), Moulins-Yzeure; P. Babin (D), Nantes; M.-A. Briand (D), Saint-Brieuc; J.A. Kraemer (FD), Sartrouville; P. Stragier (FD), Tourcoing. **F.R. Germanujo:** H. Klünder (JD), Burgsteinfurt. **Hispanujo:** J.-F. Soler Sempere (D); J. Bosch Fornals (FD), Valencia. **Hungarujo:** I. Ferenczy (FD), Győr. **Italujo:** N. Rossi (VD, FD), Napoli. **Japanujo:** Hukaya S. (JD), Tōkyō; Watanabe M. (JD), Nagano; Nomura R. (D, FD), Zjōhana. **Jugoslavio:** B. Novelić (FD), Titograd. **Kanado:** B. Waters (D), Burnaby. **Novzelando:** J. Major (FD), Wellington. **Sovetunio:** J. Gailītis (FD), Riga; D. Kolker (D), Zaporozĵje. **Svislando:** D. Schmid (FD), Zuchwil. **Usono:** W.L. Gnagy (D, FD), Juneau.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1971)

Aŭstralio: Brisbane (VD); Perth (VD). **Brazilo:** Juiz de Fora (FD stenografio). **Britujo:** Havering (FD instruado, D). **Bulgarujo:** Ŝumen (VD, FD elektro- kaj radiotekniko). **Ĉeĥoslovakio:** Prešov (D). **Danlando:** Hillerød (D); Kolby Kaas (D, FD fervojoj). **Finnlando:** Somero (JD); Kuopio (D). **Francujo:** Château-meillant (JD); Romans (D); Moulins (D); Yzeure (D). **F.R. Germanujo:** Bremen (JD); Hochdahl-Mill-

La bele ekipita Kanada Ĉambro en la Domo de UEA en Rotterdam estas — kune kun la ĉambro Simon Saft — la hejmo de la Biblioteko Hector Hodler. La ekipon de tiu ĉambro ebligis donacoj de s-ino Dorothy Henderson (Kanado), unu el la plej malavaraĵoj subtenantoj de la Asocio (vidu paĝon 78).



rath (D). Hispanujo: Bilbao (FD kooperativismo). Japanujo: Hirosima (D, JD). Jugoslavio: Ljubljana (VD). Nederlando: Leeuwarden (VD). Novzelando: Auckland (FD maristaj aferoj). Usono: Chicago (JD).

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brenander, s-ro E.; Kvänum, Svedujo
Kobel, f-ino H.; Neidenfels, F.R. Germanujo
Segura, s-ro C.; Barcelona, Hispanujo

MEMBRO-SUBTENANTO 1970

251 Moore, s-ro V.R., Novzelando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1971

122 Verstraeten, s-ro J.; Belgujo. 123 de Sousa Barbosa, s-ro A.; 124 Pereira de Souza, s-ro D.; 125 Peixoto Laguna, s-ro J.R.; 126 Silos, s-ro L.A.; 127 Trarbach, s-ro A.; Brazilo. 128 Hansen, s-ro E.; 129 Møller, s-ro P.; 130 Zacho, s-ino B.; 131 Ziegler, s-ro S.; Danlando. 132 Backholm, s-ro A.; Finnlando. 133 Dabezies, s-ro H.; 134 Larglantier, s-ro G.; 135 Tabernat, s-ro R.; Francujo. 136 Beaucaire, s-ro L.; 137 Behrmann, s-ro H.; 138 Bepperling, s-ino A.; 139 Wuenschel, s-ro H.P.; F.R. Germanujo. 140 Enríquez de Salamanca, d-ro A.; Hispanujo. 141 Waksman, s-ino H.; Israelo. 142 Terrazzani, s-ino L.; Italujo. 143 Breddels, s-ro A.; 144 Coppens-Bink, s-ino A.B.M.; 145 Kat, s-ro F.H.; 146 Laverman, f-ino A.A.; 147 Muller, s-ro J.L.; Nederlando. 148 Engen, s-ro P.; 149 Ringstad, s-ro G.; Norvegujo. 150 O'Shea, s-ro J.; Sudafriko. 151 Andersson, s-ro I.; 152 Björklund, s-ro F.; 142 Brandemar, s-ro N.; 154 Enström, f-ino M.L.; 155 Eriksson, s-ro H.; 156 Fingalsson, s-ro B.; 157 Forslund, s-ro Y.; 158 Håkansson, s-ro H.; 159 Jensie, s-ino M.; 160 Karlsson, s-ro H.; 161 Lagerkrantz, s-ro L.; 162 Lindberg, s-ro T.; 163 Möllestad, s-ro S.; 164 Olsson, f-ino A.; 165 Rydberg, s-ro H.; 166 Sjöberg, s-ro H.; 167 Stridell, s-ro K.; Svedujo. 168 Nelson, s-ro W.C.; 169 Neri, s-ro R.R.; 170 Simpson, s-ro W.P.; 171 Spant, s-ro A.G.; 172 Williams, s-ro W.; Usono.

DONACIOJ (gld.)

Fondaĵo Canuto: F.R. Germanujo: Franz Liebl, 38,20. Italujo: Luigi Minnaja, 50,—. Nederlando:

J.L. Muller, 13,12; F. Zeiler, 30,—. Sumo ĉijara ĝisnuna: 193,28.

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: F.R. Germanujo: E. Fritsch, 31,69; H.D. Hartig, 2,96; L. Jolliet, 4,93; E. Kruse, 13,81. Sumo ĉijara ĝisnuna: 96,89.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: F.R. Germanujo: ges-roj Teltz, 56,—. Sumo ĉijara ĝisnuna: 169,49.

Ĝenerala Kaso: N.N., 3,50. Aŭstralio: s-ino Gertrude Pollard, 49,78. Hispanujo: Jaime Perarnau, 6,60; José Castelltort, 6,60; Esp.-Grupo "Stelo de Paco", 2,03. Japanujo: Wilhelm Schmid, 56,40. Nederlando: s-ino H.E. Kilmer, 150,—. Svedujo: E. Carlén, 833,40. Usono: K. Hajdu, 13,64; A. Gunnar Spant, 7,43. Sumo ĉijara ĝisnuna: 1 387,18.

Kampanjo "100 x 100": (Por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum tri jaroj ekde 1971 po 100 gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj.)

18 Esperanto-Societo de heleninoj, Grekujo. 19 Walter Gieseler, F.R. Germanujo. 20 H. Wehrheim, F.R. Germanujo. 21 Einar Dahl, Svedujo. 22 H. Behrmann, F.R. Germanujo. 23 Kirk Crockett, Kanado.

Patrono A de TEJO: 30 Isiguro, T.; Japanujo. 31 Carlén, E.; Svedujo.

Por TEJO: F.R. Germanujo: A. Nieglish, 2,92. Sumo ĉijara ĝisnuna: 2,92.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio

KOREKTOJ

En n-ro 2 (de la kuranta jaro), p. 33, en la noto "Se vi tiam sciintus Esperanton..." enŝteliĝis malagrabla eraro: estas presita "la *deklinacio* de la verboj" anstataŭ "la *konjugacio*...". Ĉi-foje ne temas pri preseja koboldo — alia koboldo faris ŝercon al la aŭtoro mem (A.D. Atanasov), malatentiginte lin; la aŭtoro pardonpetas al la legantoj.

Aliaj eraretoj, jam ŝuldataj al la preseja koboldo, estas en la notoj de la sama aŭtoro en n-ro 11/1970, p. 170 (El la Lingva Servo de UEA), kie *analogio* fariĝis *antologio* kaj *nenie estas preskribita* fariĝis "...estas priskribita".

ANONCETOJ

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Multaj kursanoj de 4 leningradaj Esperanto-kursoj (studentoj, inĝenieroj k.a.) deziras korespondi. Esperanto-klubo, abon. kesto 360, Leningrado D-28, Sovetunio.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12 Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Praktikan kovrilon por via jarlibro de UEA vi povas mendi ĉe INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio. Pĉk. 42 66 60 -7. Prezo: Skr 2,60 (4 rpk., 0,50 us. dol., 1,80 gld.).

Geamantoj de legado — la Libroservo de UEA posedas kelkajn librojn, kiuj, kvankam en bone legebla stato, havas difektetojn, ekz. iom ĉifitajn aŭ sunpaligitajn kovrilojn. Jen ni ofertas al vi (*ink. kutimajn sendkostojn*):

La bela subtera mondo, 6,— (normale 7,40);

Italaj rakontoj, 1,60 (norm. 2,10);

Kanako el Kanakam, 6,— (norm. 8,—);

Kiel akvo de l' rivero (broŝ), 9,— (norm. 11,40);

Nepalo malfermas la pordon, 8,— (norm. 11,10);

Nur tri kolorojn, 2,75 (norm. 3,80);

Ombroj de la kvara dimensio, 4,— (norm. 5,70);

Reeĥoj, 2,75 (normale 3,80);

Sen eliro / La respektima P..., 4,50 (norm. 6,10);

Sonĝe sub pomarbo, 5,— (norm. 6,60);

Sub la jugo, 8,— (norm. 10,—);

Utila manlibro pri Hindujo, 3,75 (normale 5,—).

Kvantoj estas severe limigitaj. (Por mendoj celitaj al nederlandaj adresoj aldoniĝas 4%.)



Bildkartojn kaj poŝtmarkojn deziras kolekti 16-jara gimnaziano f-ino Eva Hortaj, Gbelce ĉ. 251, okr. Noví Zámky, Ĉeĥoslovakujo.

Geinfanoj el la tuta mondo sendu viajn desegnaĵojn pri diversaj temoj por urba ekspozicio okazonta la 1-an de majo ĉijare. Ĉiuj kontribuantoj ricevos diplomon de la ĉefurbestro. Adreso: Miĉo Tripkoviĉ, 84205 Mojkovac, Jugoslavio.

Nova numero de Bulteno kun poŝtkartoj por via korespondado kun Esperanto-lingvaj radiostacioj kaj aliaj estas mendebla. Prezo inkl. 20 pk: Skr 5,20 (8 rpk, 0,50 us. dol., 3,60 gld.). INTER — Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Radio, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio. Pĉk. 42 66 60-7.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton, kio multe helpas al UEA finance. Antaŭdankon!

Bonvenon al internacia Esperanto-rondo 24-29 julio en Gotenburgo. Jubilea programo. Ŝipveturo al Londona kongreso 30 julio matene. Favorajn prezojn! Petu informojn tuj! INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio. Telefono: (031) 48 95 97.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040 Springbank Road, Port Credit, Ontario, Kanado) povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi kontraŭ 1 respondkupono, kompletan liston de siaj programoj.

Radio Svedio baldaŭ havos tri novajn, fortegajn sendilojn por la mondaj programoj. Aktualigās disaŭdiĝoj en Esperanto. Proponu, skribu, reskribu al Radio Svedio, Progr. por la mondo, S-105 10 Stokholmo, Svedio. Ref.: INTER-grupo, Gotenburgo.

Infandesegnaĵojn pri la temo "Milito kaj Paco" aŭ "Popolinterkompreniĝo" por ekspozicio en diversaj germanaj urboj elpetas H. Werdermann, D-4714 Selm, Realschule. Sendu ilin ĝis julio; notu la aĝon. Helpu por sukceso!

Labori kun esperantistoj en maŝinfabrika, Hanovro. Samideanoj skribu al: s-ro Jean Rawyler, D-3012 Langenhagen, Ringstrasse 7, F.R. Germanujo.

Ferioj en Insulo Madeira. En loko la plej ŝatata, apud la maro, esperantistino luigas du ĉambrojn, banejojn, matenmanĝon. Skribu al Elisa Caetano, Estrada Monumental 244-7º Dto, Caixa 14, Funchal, Madeira, Portugalujo.

UNIVOX-kurso en Esperanto kaj 22 aliaj lingvoj nun vendiĝas en ĉiu kontinento. Petu informojn de INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio.

Universala Revuo kun adresaro "Esperanto Parolata": abonu aŭ petu specimenon (adreso en Jarlibro). Nova prezo 6,50 gld.

Internacia renkontiĝo (1-15 julio 1971) por kampadistoj, apud Mediteraneo. Informas Lentaigne, 3 av. Gaillarde, 34-Montpellier, Francujo, kontraŭ respondkupono.

Prelego per diapozitivaj pri Esperanto: ni estas pretaj fari 20 novajn seriojn por antaŭmendintoj. Skribu al Lentaigne, 3 av. Gaillarde, F-34-Montpellier, Francujo, kontraŭ respondkupono.

Noveldonita turista prospekto en Esperanto okaze de la urba jubileo 1971. Petu senpage de: Turista Oficejo, Parkgatan 2, S-411 38 Gotenburgo, Svedio.



Dudek-jara ĉeĥa hotelisto-kuiristo serĉas geamikojn en la tuta mondo kaj kolektas Esperantajn filatelaĵojn, insignojn, glumarkojn kaj bildkartojn kun temo "nacia kostumo". S-ro Vláša Hasala, S.K.N. 37, Hodonín, Ĉeĥoslovakujo.

Survoje al UK en Londono ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu la antaŭkongresan semajnon (24.7-31.7.71) en la feria centro Kosmos en Danlando. Prelegoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i.a. pri Esperanto-problemoj. Feriado en bela naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus-Instituto, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94-96, DK 2000 Kopenhago F., Danlando.

Makrobiotika nutrado — Personoj, kiuj povas interŝanĝi fakajn spertojn pri makrobiotiko, bv. skribi al s-ino Iracemã Knoedt, R. Otávio Barreto 2, Salvador, Brazilo.

En anonceto pri poemoj de Zamenhof en rusa lingvo, presita en *Esperanto*, julio-aŭgusto 1970, estas farataj ŝanĝoj: anstataŭ 100 guldenoj — 150; 50 guldenoj — 75; 31 decembro 1970 — 30 junio 1971. UEA.

Kiu havas numerojn de "Esperanto triumfonta"? Mankas al mi kelkaj por kompletigo de la kolekto. Skribu al s-ro Ramón Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Dezirado adopti plene orfan infanon el kiu ajn lando, de 6 ĝis 24 monatojn aĝan, kondiĉe ke li/ŝi estu tutsana. Bonvolu informi pri eblecoj kaj necesaj dokumentoj al s-ro Gomez Martín, str. Corbeta 8-5ª-A, Madrid-ZZ, Hispanujo.

Instituto Hodler 68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detale informas la administrantino: F-ino M.H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

La plej sukcesa disko de UEA



Kostas: nur 1,50 gld., aŭ kun akompana teksto 1,70 gld. (Por nederlandanoj: respektive, 1,71 gld. aŭ 1,94 gld.) Aldonu 10% por sendokostoj.

Ĉu vi jam legis?

IMPERATIVOJ DE LA VIVO de H. Rohden

Moderna filozofo en la moderna mondo. Li montras la vojon al paco kaj feliĉo.

Ĉe Libroservo de UEA — 2,70 gld.

Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Trimonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj **diskonigu** ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"

faka kunlaboranta asocio de UEA

(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subtenanta 50; dumviva 300)

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO-FONDAĴO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esperanto de la Sanktaj Skriboj

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852), Piazza Duomo 4, I 48100 Ravenna (Italujo)

HELSINGØR 1971

40-JARA FERIA KURSARANĜO

La internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingør okazos 25/7 – 1/8 en La Internacia Altlernejo (tute moderna). Venu al Danlando por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo kaj por partopreni nian 40-jaran jubilean aranĝon. Prospekto senpage havebla ĉe L. Friis, Ingemannsvej 9, DK-8230 Åbyhøj, Dan.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAĴ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 17-23.10. 1971. Programo baldaŭ havebla ĉe L. Friis.

BONVENON AL GOTENBURGO 1971!

Okaze de la jubilea jaro de Gotenburgo ni kore invitas vin al sestaga restado en internacia, amika Esperanto-rondo, 24-29 julio. Interesa, varia, altkvalita programo. Moderaj kostoj. Ĝustatempa ŝipveturo al UEA-kongreso en Londono favore preze aranĝota por niaj gastoj kaj aliaj esperantistoj. Petu senpagan prospekton: INTER – Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S 400 53 Gotenburgo, Svedio.

Petu ankaŭ novan turistan prospekton en Esperanto, skribante rekte al: Turista Oficejo, Parkgatan 2, S-411 38 Gotenburgo, Svedio.

ATENTU!

ANTAŬ AŬ POST LA LONDONA KONGRESO

VIZITU KEIGHLEY-n,

*la naskiĝlokon de la
brita Esperanta movado kaj
mond-faman Brontë-an Distrikton.*

LA KEIGHLEY-a ESPERANTA SOCIETO
BONVENIGOS VIN !

Por broŝuro skribu al:


Town Clerk,
Town Hall,
Keighley,
Yorkshire,
Britujo.

LABORI EN ROTTERDAM ?

Proksimume ekde aŭgusto 1971 estos bezonataj en la Centra Oficejo de UEA du oficistoj respektive por librotenado kaj grafikaj laboroj. Laboro en la plurnacia medio de la Centra Oficejo donas interalie la eblecon sperti la internacian uzon de Esperanto kiel ĉefa ĉiutaga lingvo kaj konatiĝi kun la monda movado ĉe ĝia koro mem. Se vi volus labori profesie por Esperanto kaj opinias, ke viaj talentoj kaj kvalifikaĵoj estus utilaj en la Centra Oficejo, skribu al ĝia direktoro p/a Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

LIBROTENISTO

estas bezonata por gvidado de la tuta librotenado. Dezirindaj kvalifikaĵoj: kapablo memstare kompili bilancon; sperto pri moderna librotena maŝino (ekz-e Adler Euconta); bona scio de Esperanto kaj laŭeble kono de la agado de UEA.



RAPIDA TAJPISTO

aŭ tajpistino por kompostado per IBM *Composer*. Aparta sperto pri tiu maŝino ne necesas, sed bona lingvo-scio estas postulata. Persono kun interesiĝo pri fotografio kaj aliaj grafikaj laboroj estos preferata. Eklaboro inter aŭg. kaj dec. 1971.